

Voçôj  
DE POETOJ EL  
LA SPIRITA  
MONDO

FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ



Poemoj rekte ricevitaj en Esperanto pere de  
FRANCISCO VALDOMIRO LORENZ  
(MEDIUMO)

# VOĈOJ

## DE POETOJ EL LA SPIRITA MONDO

(PLURAJ AŬTOROJ)



*Eldonfako de Brazila Spiritisma Federacio*  
DEPARTAMENTO EDITORIAL e GRÁFICO  
Rua Souza Valente, 17 – CEP 20941 – 040  
Rio de Janeiro, RJ – BRAZILIO

2<sup>a</sup> eldono

***Reeldono kadre de la omaĝoj de FEB  
al la Centjara Jubileo de Esperanto.***

*De la 4<sup>a</sup> ĝis la 5<sup>a</sup> ekzempler-milo*

Kovrilo de João Guilherme Andery Tayer

5,9 – AA; 000.2-O; 10/1987

*Copyright 1944 by*

**FEDERAÇÃO ESPÍRITA BRASILEIRA**

*(Brazila Spiritisma Federacio)*

SGAN 603 – Conjunto F– Av. L2 Norte

Brasília – DF – Brasil – CEP 70.830–030

*Kompostado, fotolitografio kaj ofset–preso de*

*Presejo de la Eldona Fako de FEB*

Rua Souza Valente, 17

20941–040 – Rio de Janeiro – RJ – Brasil

C.G.C. n.º 33.644.857/0002–84

IE. n.º 81.600.503

*Impresso no Brasil*

**PRESITA EN BRASILO**

# I N D E K S O

*Paĝoj*

Kristana Amo.....	9
Antaŭklarigo .....	11
La Preĝo estas Povo .....	15
La Misio de Esperanto .....	19

## UNUA PARTO

*Antoni Grabowski:*

Ho Polujo! .....	25
Al Batalo! .....	26
Revoj .....	27
Kuraĝon .....	28
Mia Preĝo .....	29
Poezio .....	30
Preĝo de Pentantaj Espiritanimoj .....	31
Infero kaj Ĉielo .....	32
Elreviĝo .....	33
Ho Dio, Venu Via Regno! .....	34
Juĝado de Animo .....	35
Kio Estas la Naturo? .....	36
Al la Ateistoj I .....	37
Al la Ateistoj II .....	39
Kristnaska Mesaĝo .....	41
Paska Mesaĝo .....	42
Kial Vi Plendas? .....	43
Kial Preĝi? .....	44

*João da Cruz e Souza:*

Al la Karaj Fratoj Esperantistaj I .....	45
Al la Karaj Fratoj Esperantistaj II .....	47

Al la Kara Frato Ismael Gomes Braga .....	48
Rememoro .....	49
Animo Libera .....	50
Pri la Vivo de la Spiritoj .....	51
Ne Plendu! .....	52
Migradoj de l' Animo .....	53
Kion Instruas la Malbono .....	54
La Trompiĝo de l' Sinmortigintoj .....	55
Se Vi volas .....	56
Nia Mesaĝo .....	57

*K:*

Kiam Venos Hela Tago? .....	58
Pacienco .....	59
Du Gloraj Datoj .....	60

*L. L. Zamenhof:*

Al la Samideano Ismael Gomes Braga .....	61
Al la Esperantistaro .....	63
Kelkaj Paroloj .....	65
Venos la Taglumo! .....	66
Vizio de l' Estonteco .....	67
Ho Mia Kor'! .....	68
Leciono de Frateco .....	69
Respondo al Nejusta Kritikulo .....	70

*Stanislav Schulhof:*

Ankaŭ mi Volas Kunlabori .....	71
Himno al la Laboro .....	73
Himno al la Vivo .....	74
Feliĉaj estas la Malriĉaj en Spirito .....	75
Instruado de la Historio .....	76
Esperanto .....	78
Spirita Heroeco .....	79
Preĝo pri Paco .....	82
Ĉu devas Esti Tio? .....	83
Spirita Amo .....	85
La Beno de l' Silento .....	86
Sur la Kruco .....	87
La Releviĝo de la Spirito .....	88

	<i>Paĝoj</i>
Ho, Kiam?! .....	89
La Ĉieliro .....	90
Vero, Bono kaj Belo .....	91
Konsiloj .....	92
La Milito .....	93
Rememoro kaj Forgeso .....	94
La Paco de l' Sinjoro .....	95
14 <sup>a</sup> de Julio .....	96
Levu Vin al la Sinjoro .....	97
Kiam la Tero havos Pacon? .....	98
? .....	99

*Teodoro A Dolejš:*

Frata Saluto .....	102
Ne Perdu la Esperon! .....	104
Similaj kaj Malsimilaj .....	105
Pri la Ĉiela Urbo .....	106
“Se “ .....	107
Libera Volo .....	108
Profitu la Tempon! .....	109
Post tridek tri Jarcentoj .....	110
Paroli kaj Silenti .....	111
Naturo kaj Arto .....	112
Pri la Amo .....	113
Al Francisko Kandido Xavier .....	114
Al la Novjaro 1944 .....	115
La Virino .....	116
Trosekeco kaj Pluvo .....	117
Pri l' Gefilaj Devoj al la Gepatroj .....	118

## DUA PARTO

*Abílio Guerra Junqueiro:*

Eterna Viktimo .....	121
----------------------	-----

*Antero do Quental:*

Al la Morto .....	124
Post la Morto I .....	125

Post la Morto II .....	126
Post la Morto III .....	127

*Antônio Nobre:*

Al la Mondo .....	128
-------------------	-----

*Augusto dos Anjos:*

La Doloro .....	129
Homa Voĉo .....	130
La animo .....	131

*Casimiro Cunha:*

Kvarversaĵoj .....	132
Versoj .....	134
Ombro kaj Lumo .....	135
La Trompiĝo .....	136
Simbolo .....	137

*Casimiro de Abreu:*

La Tero .....	138
---------------	-----

*João de Deus:*

La Leprulo .....	141
Bonkoreco .....	142

*Raul de Leoni:*

Soneto .....	143
--------------	-----

---

# KRISTANA AMO

SANKTA PAŬLO

(*El la Unua Epistolo al la Korintanoj: Ĉap. XIII, vers. 1 – 7.*)

*Se, parolante la lingvojn de l' homoj  
kaj de l' anĝeloj, mi veron atestus,  
sed sen amsento, mi kvazaŭ metalo  
estus sonanta nur vane, aŭ estus  
kvazaŭ sensente tintanta cimbalo;*

*Se mi posedus kapablon profeti,  
ĉiujn misterojn, sciencojn konpovus,  
kaj se mi fidon tielan je Dio  
havus ke montojn per ĝi mi formovus,  
tamen sen Amo mi estus nenio.*

*Mian havaĵon donante, se multajn  
homojn de mort' per malsato mi savus;  
se mi, ke brulu ĝi, eĉ ne hezitus  
doni la korpon, sed Amon ne havus,  
tio al mi ja neniom profitus.*

*Amo bonfaras sen serĉi profiton,  
sin ne ŝveligas, neniam koleras,  
fari malbonon neniam intencas,  
ne fanfaronas, sen plendi suferas;  
ĝi ne envias, nur bonon pripensas.*

*Amo kondutas laŭ decaj kutimoj,  
ĉion konfide eltenas, toleras,  
ĉiam la juston kaj veron obeas,  
firme ĝi kredas je Di' kaj esperas.  
Amo kristana neniam pereas.*

*El la antikva greka lingvo poezie parafrasis.*

F. V. LORENZ



## ANTAŬKLARIGO

Vi, kiuj sufiĉe scias pri la spiritisma doktrino, ne necesas legi mian antaŭparolon, ĉar al vi ĉio estas klara en tiu ĉi libreto; legu nur la poemojn.

Vi, kiuj ne scias pri Spiritoj, sed akceptas ilin kiel la Muzojn de la poetoj, vi ankaŭ ne bezonas mian klarigon; al vi interesas nur la versoj, sed ne iliaj Aŭtoroj, ĉar vi ne estas demandemaj.

Vi, fine, kiuj postulas klarigojn pri la vortoj “mediumo” kaj “spiritismo”, bonvolu pacience legi tiun ĉi antaŭparolon. Mi penos komprenigi al vi la sencon de tiuj du vortoj.

Ni unue malfermu niajn vortarojn. Jen la difinoj en la “Filozofia Vortaro” de D-ro Stan. Kamaryt:

**Mediumo.** – En spiritismo persono, kiu peras kontakton inter mortintoj kaj la vivantaj partoprenantoj de la “kunsido”, aŭ kiu posedas potencon aperigi la ceterajn spiritismajn fenomenojn, ekz. ektoplasmon, telekineton k. s.

**Spiritismo.** – Konvinko, ke homaj animoj konsistas el speciala substanco nemateria (perispirito, astralo) sed tamen posedanta ian pezon, kaj ke tiuj animoj vivas post la morto de la homo ekster la mondo alirebla per sensoj, eble en supozata kvara dimensio de spaco. Tiuj animoj povas pere de homoj posedantaj specialan kapablon por tio (mediumoj) kontakti kun la sensa mondo ĉu kaŭzante diversajn fenomenojn (frapetado de tableto, frapoj en muroj kaj plafonoj, leviĝo de objektoj), ĉu prenante sur sin videblajn formojn de strangaj sta-

turoj (materiiĝo de spiritoj). La plej fama inter libroj kompilitaj teoriojn kaj atestojn pri spiritismaj fenomenoj estas Allan Kardec: La Libro de la Spiritoj (“Le Livre des Esprits”) eldonita en la jaro 1857. <sup>(\*)</sup>

Tiuj difinoj estas bonaj, sed ni vidu aliajn pli konatajn kaj popularajn, en la “Plena Vortaro de Esperanto”, de Profesoro E. Grosjean-Maupin:

**Spiritismo.** – Doktrino asertanta la eblecon interrilati kun animoj de la mortintoj.

**Mediumo.** – Homo, kiu, laŭ la spiritisma doktrino, havas la kapablon servi kiel peranto inter la homoj kaj la spiritoj de la mortintoj.

Tiuj difinoj estas bonaj, sed ne sufiĉaj, ĉar laŭ la spiritisma doktrino, ne nur la Spirito de mortinto povas komunikiĝi per mediumo; ankaŭ la Spirito de vivanto – precipe dum la dormo de la korpo – povas komunikiĝi per mediumo. Laŭ mia scio, la plej fama mediumo, kiu ricevis multajn komunikaĵojn de Spiritoj de vivantoj, estis nia karmemora samideano William Thomas Stead, naskita en la 5<sup>a</sup> de julio 1849, en Embleton, kaj mortinta en la 21<sup>a</sup> de aprilo 1912 en la submariĝo de la ŝipo “Titanic”. Li estis la plej konata, sed ne la sola mediumo, kiu ricevis aŭ ricevas komunikaĵojn de la Spiritoj de vivantoj. Tamen, plej ofte la mediumoj ricevas Spiritojn de mortintoj; ĉar la Spiritoj de vivantoj povas sendi al ni sian penson per la poŝto, per telefono, per gazetoj kaj libroj, uzante sian propran korpon; tial, se oni petus mian opinion, mi proponus aldoni al tiuj di-

---

<sup>(\*)</sup> “La Libro de la Spiritoj” aperis en la 18<sup>a</sup> de aprilo 1857, sed ne en 1853 kiel estas erare presite en la “Filozofia Vortaro”. Ĝia eldono en Esperanto estas en preparado nun kaj aperos baldaŭ.

finoj la jenon: “...peranto inter la homoj kaj la spiritoj (plej ofte de mortintoj, sed ankaŭ de vivantoj)”, por igi science pli preciza la difinon.

Laŭ la spiritisma doktrino, la mediumeco estas eterna, kvankam la vorto estas nova; ĝi unue aperis en 1857<sup>a</sup> en “La Libro de la Spiritoj”. La sama kapablo, nun nomata mediumeco, ekzistis en la profetoj, en la mistikuloj, en la fondintoj de religioj, en sanktuloj, en multaj geniaj homoj, kiuj konscie aŭ nekonscie ricevis inspiron kaj helpon el la spirita mondo. Do, la homaro tre multe ŝuldas al la mediumoj; sed ne nur bonaj Spiritoj komuniĝas kun la homoj pere de mediumoj. Ankaŭ la malbonaj povas komuniĝi kaj misgvidi la homojn; tial la religioj, ekde la tempo de Moseo, malfavoras la mediumecon. Sekve, la fakto ke iu verko estas mediumeca, ne signifas ke ĝi estas nepre bona; ĝi povas esti eĉ tre malbona, aŭ banala, ĉar ne ĉiuj Spiritoj estas bonaj, kleraj, saĝaj. Oni devas tre severe juĝi la verkojn de la Spiritoj, same kiel la verkojn de la homoj, ĉar Spiritoj estas ĉiam homoj, nur homoj, ne dioj. Malpermesi la mediumecon ne estas eble, ĉar plej ofte la mediumo mem ne konscias pri siaj kapabloj; ili agas, parolas, skribas, sub influo de Spiritoj, sed opinias, ke li agas mem en plena respondeco. Do, eĉ la plej pasia malamiko de la mediumeco, povas esti mediumo nekonscia pri sia kapablo. Eble vi mem, Estimata Leganto, estas mediumo, kvankam vi neniam pensis pri tio. Mi opinias, ke mi neniel estas mediumo, sed eble mi eraras; eble mi ricevas pensojn, sentojn, influojn, – bonajn kaj malbonajn – de la Spiritoj.

Laŭ la spiritisma doktrino, ĉiu homo havas almenaŭ latentan mediumecon, kiu iam manifestiĝos. Kompreneble, la mediumeco ŝuldas al la spiritisma doktrino nur sian nomon, sed ĝi neniel dependas de Spiritismo, aŭ de iu ajn doktrino; ĝi estas natura kapablo, kiel la inteligento aŭ la energio. Per ekzercado ĝi povas grandiĝi,

sed ankaŭ la ekzercado povas efektiviĝi sen konscio pri tio. Kiam verkisto ekzercas sin en la verkarto, samtempe li grandigas sian mediumecon por ricevi verkojn de Spiritoj, eĉ se li neniel kredas je Spiritoj kaj nenion scias pri mediumeco.

Nu, nia respektinda samideano prof. Francisco Valdomiro Lorenz estas mem poeto kaj mediumo por spiritalaj poetoj. Kiam li mem verkas poezion, li pensas, kalkulas silabojn, elektas rimojn, ŝanĝas verson tie ĉi, elektas sinonimon tie, malfermas kaj refermas vortarojn, en longa kaj pacienca laborado kaj pripensado. En la morgaŭa tago, li retralegas atente la poemon kaj repoluras ĝin. En la tria tago li enpoŝtigas ĝin; sed post kvar tagoj li hazarde relegas la kopiaĵon de la sendita poemo kaj trovas ion nebona. Li tuj skribas leteron al la eldononto, kaj ordonas novan ŝanĝon.

Sed kiam li skribas kiel mediumo, li ne pensas, lia cerbo ne laboras, li nur aŭskultas kaj aŭdas la versojn, unu post alia, en malrapida diktado, kaj fine li aŭdas la nomon de la poeto. Li nenion kalkulas, nenion mezuras, nenion elektas nek poluras. Do, li neniam povus konfuzi sian propran verkadon kun la verko de la Spiritoj, mediumece ricevita. Tian klarigon li donis al mi en leteroj kaj li legis tiun ĉi antaŭklarigon kaj ĝin konfirmis per malgrandaj korektoj.

Li ne estas unika. Tra la tuta mondo estas mediumoj, kiuj skribas librojn. Inter miaj intimaj amikoj estas alia tre estimata mediumo, kiu jam ricevis pli ol 20 volumojn tre ŝatatajn. El tiuj volumoj, kvar estas en versoj de proksimume 50 Spiritoj de tre konataj poetoj, kaj la ceteraj volumoj, en prozo, estas romanoj, noveloj, rakontoj, sciencaj verkoj pri diversaj temoj, religiaj komentarioj. Tiu dua mediumo, kies nomo estas Francisco Cândido Xavier (legu: Fransisku Kándidu Ŝavjer'), kontraŭe al S-ro Prof. Lorenz, estas tre juna kaj neklera, sed modesta vilaĝano. Ricevitaj de tiu juna me-

diumo estas kelkaj vere rimarkindaj historiaj romanoj, kiujn oni intencas eldoni en Esperanto tre baldaŭ.

Pri la spiritisma doktrino, du gravaj verkoj estas en preparado por baldaŭa apero en Esperanto; tial mi povas nun silenti. Lernemaj samideanoj trovos en tiuj volumoj la klarigojn, kiujn mi ne scias doni tie ĉi.

\*  
\* \*

La spiritisma doktrino konsilas ĉiam la preĝadon. Tial ke mi ne sciis per propraj vortoj klarigi la preĝon, mi permesas al mi transskribi tie ĉi artikolon de fama moderna sciencisto pri la preĝo. La fama aŭtoro de la artikolo estas D-ro Aleksis Karrel, kaj la tradukon ni ŝuldas al S-ro Konstantino Nikolao Blasĉikov.

Tiu klarigo ŝajnas al mi oportuna, ĉar kelkaj el la ĉi-tieaj poemoj estas preĝoj.

## LA PREĜO ESTAS POVO

*De D-ro ALEKSIS KARREL, kuracisto.*

*La preĝo ne estas nur adorado; ĝi estas ankaŭ nevidebla ekzaltiĝo de l' homa adorema spirito – la plej fortika energia formo, kiun oni povas krei. La preĝa influo sur la homaj menso kaj korpo estas tiel demonstrebla kiel la influo de sekreciantaj glandoj. Oni povas mezuri ĝian rezulton per termoj de l' aldonita fizika vigliĝo, per pligrandigita forto, per morala karakteriĝo kaj per la plej klara komprenado pri realecoj, kiuj substrekas ĉiujn homajn rilatojn.*

*Se oni alkitimiĝas sincere preĝi, ties vivo tre rimarkinde kaj profunde aliformiĝas. Ĉar la preĝo markas per sia nedetruibla signo ĉiujn niajn agojn kaj nian konduton. Oni povas vidi, en tiuj kiuj havas siajn internajn vivojn tiamaniere riĉigitaj, elportan trankvilecon, vizaĝan kaj korpan ri-*

pozon. *Interne de ilia konsciencfundo ekbrulas flamego. La homo vidas sin mem. Tiam li eltrovas sian egoismon, sian stultan malhumilecon, siajn timojn, sian avidecon kaj siajn malsaĝaĵojn. Tiam li akiras senton de l' morala devo, intelektan humilecon. Tiamaniere komenciĝas anima vojaĝo al la graca regno.*

*La preĝo estas forto tiel reala kiel la gravitado de la Tero. Kiel kuracisto, mi vidis homojn liberiĝintajn el malsano kaj el melankolio per serena preĝa klopodado, post kiam ĉiuj aliaj rimedoj estis malsukcesintaj. Ĝi estas la sola forto en la mondo, kiu ŝajnas superi la tiel nomitan "naturalan leĝon", kaj okazoj, kiam la preĝo faras tion, estas nomataj "mirakloj". Sed la miraklo konstanta, pli kvieta, okazas ĉiuhore ĉe viraj kaj virinaj koroj, kiuj eltrovis ke la preĝo donas al ili ĉiaman fluon de subtenanta forto por ilia ĉiutaga vivo.*

*Tre multe da homoj konsideras la preĝon kiel rutinan formalizaĵon el vortoj, kiel rifuĝon por malfortuloj aŭ kiel infanan peton de objektoj materiaj. Bedaŭrinde ni misŝatas la preĝon konceptante ĝin en tiaj terminoj kvazaŭ ni konsiderus pluvon priskribante ĝin kiel ion, kio simple plenigas niajn ĝardenajn akvuĵetojn por la birdoj. Kiam bone komprenata, la preĝo estas matura kaj necesega aktiveco por la plej plena persona evoluado – la lasta kompletigo de l' homaj grandegaj kapabloj. Nur per la preĝo oni altiras tiun plenan kaj harmonian kunligon de korpo, menso kaj spirito, kiu donas al malforta homa estulo lian neskueblan forton.*

*La vortoj: "Petu kaj estos al vi donite" estas pruvataj de la homara sperto. Estas vere ke la preĝo povas ne revivigi mortintan infanon aŭ ne ĉesigi korpodoloron, sed ĝi, simile al radiumo, estas fonto de luma kaj ekscitanta energio.*

*Kiamaniere la preĝo nin fortigas per tia grandega dinamisma povo? Por respondi tiun demandon (forlasante la sciencan kampon) mi devas demonstri ke ĉiu preĝo havas ion komunan. Triumfaj hosanoj en grandioza katedralo aŭ modestaj petoj de indiana ĉasisto, petanta bonan ŝancon dum ĉasado, montras la saman veron: ke homaj estuloj serĉas pligrandigi sian limigitan energion direktante sin al la Infinita fonto de ĉiuj energioj.*

*Kiam ni preĝas, ni kunligiĝas al neelĉerpebla kaj moviga forto, kiu regadas la universon. Tiam ni petas ke parto el tiu ĉi forto estu aldonata al niaj necesoj. La peta ago mem plenigas niajn homajn mankojn kaj nin ekstarigas fortigitaj kaj trankviligitaj.*

*Sed neniam ni devas alvoki Dion simple por kontentigo de niaj kapricoj. Ni eltiras multege da forto el preĝo kiam ni ĝin uzas ne kiel peton, sed kiel deziregon ke ni povu fariĝi pli similaj al Li. Preĝo devas esti konsiderata kiel la ago estadi ĉe Dio. Maljuna kamparano sidis, sola, sur la lasta benko de vilaĝa preĝejo. “Kion vi atendas?” oni demandis lin. Kaj li respondis: “Mi rigardas Dion, kaj Li rigardas min”. Homo preĝas ne nur por ke Dio lin memoru, sed ankaŭ por ke li mem memoru Dion.*

*Per kia maniero oni povas difini la preĝon? Ĝi estas homa klopodado por atingi Dion, partopreni kun nevidebla Estulo, kreanto de ĉiuj aĵoj, kiu estas superegaj vero, beleco kaj forto, patro kaj elacētinto de ĉiu homo. Tiu ĉi preĝa celo ĉiam restas kaŝita al la inteligenteco, ĉar ambaŭ, parolo kaj penso, ne estas sufiĉaj kiam ni ekprovas priskribi Dion.*

*Tamen, ni scias ke, ĉiufoje kiam ni direktiĝas al Dio en fervora preĝo, ni plibonigas niajn animon kaj korpon. Estas neeble al iu homo preĝi, unu solan momenton, sen akiri ian bonan rezulton. “Neniu jam preĝis iaforte”, diradis Emersono, “nepovinte eklerni ion”.*

*Oni povas preĝi ĉie. En la strato, en subtera fervojo, en kontoro, ĉe vendejo, en lernejo, tiel same bone kiel en izoliteco de sia ĉambro aŭ ĉe popolamaso en preĝejo. Ne ekzistas por preĝi ia priskribita tempo, loko aŭ pozicio.*

*“Pensu pri Dio pli ofte ol vi spiras”, diradis Epiktetus, ia stoikisto. Por povi vere formi personecon, la preĝo devas estiĝi kutimo. Estas senvalore preĝi matene kaj vivi kiel barbarulo la reston de la tago. Vera preĝo estas vivmaniero; la plej vera vivo estas, laŭlitere, preĝa vojo.*

*La plej bonaj preĝoj similas al improvizaĵoj de talentaj geamantoj, ĉiam traktantaj la saman temon, sed neniam dirantaj la samajn vortojn. Ni certe ne povas esti tiel kreantaj per la preĝo kiel Sankta Tereza aŭ Bernardo de Clairvaux; ili ambaŭ elfluigis siajn adoradojn per paroloj de mistika*

*beleco. Feliĉe, ni ne bezonas ilian elokventecon; nia plej sensignifa impulso al preĝo estas akceptata de Dio. Eĉ se ni estas netolereble mutaj aŭ se nia lango estas troŝarĝita de vaneco aŭ senutileco, niaj plej nekompletaj laŭdaj silaboj estas akceptataj de Li kaj Li nin kovras per pluvo de fortikigantaj manifestacioj de Sia amo.*

*Hodiaŭe, pli ol iam antaŭe, la preĝo estas necesa ligilo en homaj naciaj vivadoj. La rimarkinda manko de religia sento alkondukis la mondon al bordo de l' detruo. Ni bedaŭrinde forlasis neelvolvita nian plej fundan fonton de l' povo kaj perfektigo. La preĝo, baza spirita ekzercado, devas esti aktive praktikata en nia privata vivo. La neglektita homa animo devas estiĝi sufiĉe forta por regi denove. Ĉar, se la preĝa forto liberiĝos kaj estos uzata en la vivo de ĉiu viro kaj virino, se la spirito deklaras klare kaj kuraĝe sian celon, tiam ekzistos ia espero ke niaj preĝoj por plibona mondo estos responditaj.*

Memkompreneble la preĝo estas komuna al ĉiuj religioj. Eĉ la pozitivaj filozofoj, de la Skolo de Aŭgusto Comte, preĝas kaj havas libron de belaj preĝoj, kvankam ili ne kredas je Dio kaj la senmorteco de la animo. Do, preĝo ne estas aparta apartenaĵo de la Spiritismo, sed ordinare la spiritistoj estas en konstanta preĝado kaj kredas, ke per senĉesa preĝado ili ĉion bonan atingas.

\*  
\* \* \*

Al vi, esperantista Leganto, certe interesas scii ankaŭ ion alian, nome: kion la spiritisma doktrino instruas pri nia mondlingva ideo. Do vi estu pli pacienca ol la aliaj kaj legu plu.

Spiritismo instruas, ke la loĝantoj de nia planedo estas ĉiam la samaj Spiritoj en longa serio da reenkar-niĝoj. Ĉiu enkarniĝo estas lerneja tago; la Spirito lernas kaj progresas ĉiam en sentoj kaj inteligento, morale kaj intelekte; tial venos tempo, kiam ĉiuj loĝantoj de sur



la Tero estos atingintaj la progresan ŝtupon, kiun la nunaj esperantistoj jam atingis. Tiam ĉiuj dezirus lingvon internacian kaj lernos ĝin. Laŭ la spiritisma doktrino, do, la ideo de Esperanto nepre venkos la mondon; sekve, ĉiu klera spiritisto defendas Esperanton. En Brazilo, la ĉefa spiritisma Federacio de Asocioj laboras por la disvastigo de Esperanto, same kiel por la diskonigo de Spiritismo.

En januaro de 1940, mi ĉeestis spiritisman kunsidon en la urbeto Pedro Leopoldo, kaj la Gvidanta Spirito skribis fervoran mesaĝon pri nia laborado kaj min frate salutis kiel propagandiston de Esperanto. Jen traduko de tiu mesaĝo:

### LA MISIO DE ESPERANTO

*Dum la multnombraj aliformiĝoj de la mondo, ne multaj estas la centroj, kiuj sin instalas nun sur la Tero, celante starigi la estontecon de la homaro. Se ĉie ni konstatas la disfalon de la homaj konstruaĵoj, renovigante la vojon de l' civilizacio, ni rigardas ankaŭ tiujn armeojn da laboristoj por la konstruaĵoj de l' estonteco, kvazaŭ konstruantoj de nova mondo, dissemiĝantaj sur la teraj vojoj, sed klopodantaj por rektigi iliajn direktojn. Estas tiuj ja la laboristoj de la Dia progreso, firme tenantaj en la manoj la potencan pioĉon de la fido super ĉio al Tiu, Kiu estas la lumo de niaj destinoj. En la amaso de tiu preparado de renovigaj energioj celantaj la venontan jarmilon, mi deziras menciigi Esperanton, fratece ĉirkaŭprenante nian fraton, kiu fariĝis sincera proklamanto de ĝia afero, en oboe al la Dia determinismo de l' taskoj ricevitaj en la lumo de l' spirita mondo.*

*Jesuo deklaris, ke Li ne venis sur nian planedon por detrui la Leĝon, same kiel Spiritismo en sia formo de Konsolanto ne starigis sin por elpeli la ekzistantajn religiojn. La Majstro venis por plenumi la principojn de la Leĝo tiel same kiel la konsolanta Doktrino venas por restarigi la Veron kaj reenkonduki la esperon en la korojn en tiu ĉi*

*trura tempo por la mondo, kiam ĉiuj moralaj valoroj de la mondo estas ĝisfundamente en danĝero antaŭ la doktrinoj de l' perforto, kiuj ebruiĝis la cerbon de l' nuntempa civilizacio, kiel maldolĉa veneno pereiganta la energion de maljuniĝinta korpo. Esperanto ankaŭ ne venis, amikoj, por detruigi la lingvojn uzatajn en la mondo en la interŝanĝado de la pensoj. Ĝia Misio estas la alta tasko de unuigo kaj kunfratigo, celante la universalan unuecon. Ĝia principo estas konkordo kaj ĝiaj apostoloj estas egale laborkunuloj de ĉiuj, kiuj sinoferadis por la dia idealo de l' homa solidareco, ĉu en ĉi tiuj, ĉu en aliaj cirkonstancoj.*

*La Helpa Lingvo estas unu el la plej fortaj vokoj al frateco ankoraŭ aŭdataj sur nia planedo malriĉiĝinta je spiritaĵoj, en la nuna momento de apartigemo, de aŭtarkio, de kolektiva egoismo, de falsita naciismo. La ekzemplo de l' moderna Eŭropo donas al ni ideon pri tiu dolora situacio: Ĉiuj popoloj havas entuziasmajn advokatojn, kiuj per varmegaj paroladoj pravigas tiun aŭ alian decidon de siaj registaroj. La nacioj estas grandaj tribunoj, kie ĉiu parolas pri si mem kaj humiligas la laborojn de sia frato. Oni protektas ĉiun politikan krimon, se ĝi nur estas farita interne de la landlimoj. Tamen la granda Eŭropo, tiu patrino noblega estajo, kiu kunlaboris por la homa perfektigo, kiu instruis kaj edukis altigante la spiriton de la mondo, tiu havas neniun advokaton, posedas neniun voĉon por aŭdigi la ĝemojn de sia disŝirita koro, ĉar la landlimoj apartigis ĉiujn ĝiajn infanojn per dikaj muroj el sablo kaj ŝtalo, ĝin transformante en tiun dezerton malĝojigan por la koroj, kie ne ekzistas la fonto de amo por refortigi la animojn.*

*Ja, en la nuna tempo Esperanto estas forto promesanta unuigon kaj harmonion, ĉar ĝi faciligas la interŝanĝon de la universalaj valoroj.*

*Ĉu revo? Ĉu propagando nur per parolo? Ĉu nova movaĵo por starigi ekonomian profiton? Ĉiuj tiuj ĉi supozoj povos esti eldirataj de malatentaj spiritoj; sed nur de l' malatentaj, kiuj atendas la ĝeneralan aliĝon por poste eldiri sian sangenan elekton. Tamen tiuj, kiuj serĉas la lumon de la sincereco por ekzameni ĉiujn aferojn, tiuj scipovos trovi en la esperantista movado tiun renovigan lumon, kiu en sanktaj efektivecoj, jam nun, heligos pli malfrue la ideojn de la*

*mondo, elstarigante la noblecon de ĝiaj principoj direktataj de tiu frateca sento, kiu venas el la Dia penso de Jesuo por ĉiuj verkoj de l' homa evoluado.*

*Esperanto estas leciono de l' frateco. Ni lernu ĝin por esplori sur la Tero la penson de la suferantoj kaj laborantoj sur aliaj kampoj. En laŭvorta senco mi diras: "ni lernu ĝin", ĉar ni ankaŭ estas viaj laborkunuloj, kiuj jam akiris la esprimon de l' universala penso, kaj al vi deziras tiun saman spiritan bonon, por ke tiamaniere ni organizadu sur la Tero la plej efikajn movadojn por unuecigo.*

*Dio estas adorata de la homoj tra multnombraj lingvoj, kiuj estas la sektoj kaj religioj, ĉiuj celantaj la mirindan bonon de l' esenca unueco. Ni kopiu tiun saĝan klopodon de la Dia naturo kaj marŝu al la sintezo de la esprimo, malgraŭ la diverseco de l' procedoj per kiuj vi esprimas viajn pensojn. Tiu tuta penado apartenas al la justa frateco kaj nun, petegante al Jesuo, ke Li benu la laborojn kaj esperojn de nia ĉeestanta frato, sanktigante la penadon lian kaj de liaj laborkunuloj en la sama tasko, kiu estas al ili donita de la spiritaj energioj, mi lasas al vi ĉiuj mian deziron de paco, esperante por ni ĉiuj, humilaj disĉiploj de Kristo, la refortigantan benon de Lia amo.*

EMMANUEL.

Laŭ la instruoj de la Spiritoj, D-ro Zamenhof estis sendita de Dio al la Tero, kiel granda Misiisto, por plirapidigi la progreson de la homaro; do li estas Spirito multe pli alta ol la ordinaraj loĝantoj de la Tero, kaj la sinceraj helpantoj de D-ro Zamenhof ankaŭ enkarniĝis kun la difinita tasko labori por la homaro pere de Esperanto, kvankam tiuj helpantoj ne estas superaj Spiritoj, kiel la Majstro. Pri tio aludas Emmanuel, salutante nin esperantistojn. En tiu senco, nia laborado por Esperanto estas iel sankta laboro al ni difinita de Dio.

ISMAEL GOMES BRAGA

**UNUA PARTO**

**ORIGINALAĴOJ**



*Antoni Grabowski*, inĝeniero, naskiĝis en Nowe Dobre (Pomeranio) en la 11-6-1857 kaj mortis en Varsovio en 4-7-1921. La plej fama esperantista poeto de sia tempo, li grande influis en la formado de la lingvo kaj literaturo de Esperanto. Liaj verkoj estas klasikaj kaj citataj kiel modelo de stilo en egalrajteco kun Zamenhof.

### HO POLUJO!

Polujo, patrolando de Sufero!  
 Ĝis kiam fluos de gefiloj ciaj  
 amaraj larmoj, kaj la malespero  
 tentados cin per kruelaĵoj siaj?!

Ho Dio, kiam via mano benos  
 patrujon mian, redonante pacon?!  
 Ha! kiam de sanig' la tago venos?!  
 Ĉu ne meritas ĝi la bendonacon?!

Martira lando! La sufer' purigu  
 vilaĝojn, urbojn ciajn, el eraroj,  
 l' animojn de l' nacio unuigu  
 kaj ĝin konduku re al gloraj faroj!

7/8/1943

Antoni Grabowski.

## AL BATALO!

Eksonis voko de l' Ĉefgeneralo  
de la spiritsoldatoj:

“Al batalo!

Defendu nin kaj tutan la homaron,  
defendu la plej bonan idearon!  
Jam proksimiĝas la decida horo  
de l' venko, proksimiĝas jam la gloro  
de l' reekbrilo de l' libera mondo  
kaj de l' ĝojkanto de l' frateca rondo.  
La nuboj de l' mallumo maldensiĝas,  
blasfema la perforto malfortiĝas;  
batalu nelacante, Di-armeo,  
ĝis malaperos de l' sklavig' l' ideo!  
Al ĉiuj homaj entoj kaj nacioj  
libero floru post la tragedioj  
teruraj de l' milita uragano!”

Kaj la spiritoj, kun la ben' de l' mano  
de Kristo, ekbatalis laŭ ordono  
sub la standardo de la ver' kaj bono.

8/8/1943.

Antoni Grabowski.

## REVOJ

Ne nur la surter-loĝantoj revas  
pri plibona sorto kaj feliĉo,  
kiu iutage veni devas,  
aŭ pri amo, arto, scio, riĉo.

Ankaŭ ni en la spirita mondo  
ofte revas pri estonto tia,  
kiam via mens' en ama ondo  
levas sin al alta sfer' vizia.

Kaj ni revas pri la temp' feliĉa,  
kiam ĉiuj spiritontoj estos  
puraj, saĝaj kaj kun am' sufiĉa  
Di-fajrero en si manifestos.

Tiu Di-fajrero estas nia  
plej valora Dia vivdonaco:  
ĝi nin unuigas, per magia  
forto ĉiujn en la vol' kaj paco.

18/8/1943

Antoni Grabowski.

**KURAĜON!**

Kuraĝe antaŭen, ho fratoj amataj!  
Ne perdu la fortojn, dubante pri l' vero!  
La dubo kondukas al la senkompataj  
furioj perfidaj de l' fi-malespero!

Ne estas ja songo, ne estas ĥimero  
ĉi tiuj paroloj, al vi direktataj  
el nia rilate pli alta ĉi sfero:  
ver-fakt' ili estas, kaj ne mensogataj.

Ĉu l' mondo ricevos ja ilin kun moko,  
ĉu diros ja multaj ke vi iluzias?  
Ne timu, kuraĝe aŭskultu, la voko

de l' vero ne trompas, ĝi ne fantazias.  
Laŭeble daŭrados paroli la mondo  
spirita al la laborema fratrondo.

3/9/1943

Antoni Grabowski.



## MIA PREĜO

Tra la mondo raŭka vento  
blovas ĉiam pli;  
plivastiĝas la turmento  
de l' milit-furi'.

Ke revenu pacaj tagoj,  
Dion petas mi;  
ke jam ĉesu tiuj plagoj  
de l' infer-orgi'.

Preĝas mi, ke l' Idealo  
alta de l' Mesi'  
iĝu, homoj, plenrealo  
baldaŭ, inter vi.

Fratoj, mian vokon aŭdu  
de sincera pi';  
vivu tiel ke vin laŭdu  
l' anĝeloj de Di'.

15/9/1943

Antoni Grabowski.

**POEZIO**

Poezi', birdet' ĉiela,  
sonu via kanto bela  
pri la pura am' fidela,  
pri la bono kaj la vero,  
lumbrilindaj sur la tero,  
kiel en spirita sfero!

Poezio, de l' animo  
vi muziko, ritmo, rimo,  
lingvo de la mond-senlimo,  
kantu pri l' esper' de l' koroj,  
pri iliaj ĝoj', doloroj,  
de l' progreso pri laboroj!

Kantu pri la Di-ordono,  
pri l' feliĉo de la bono,  
pri la beno de l' pardono,  
de l' estonto pri l' vizio,  
de l' malbon' pri l' iluzio:  
vivu, vera Poezio!

16/9/1943

Antoni Grabowski.

## PREĜO DE PENTANTAJ SPIRITANIMOJ

Ho Dio, plej bona estulo el ĉiuj  
spiritoj ajn, kiuj pensadas kaj sentas:  
Ke Vin ne konadis ni kiel Bon-eston,  
pardonon ni petas kaj vere ni pentas.

Ho Dio, pardonu, ke false ni kredis,  
ke Vi propravole nin punas, turmentas,  
aliajn pro pio ĉielen levante:  
pardonon ni petas kaj vere ni pentas.

Ke ni multafaĵe surtere enfalis  
en pekojn, per kiuj Memamo nin tentas,  
ke ni egoisme, fiere vivadis,  
pardonon ni petas kaj vere ni pentas.

Ke la proksimulojn ne ĉiam ni amis,  
sed sekvis la leĝojn ni, kiujn inventas  
spirito malama, flatema, venĝema:  
pardonon ni petas kaj vere ni pentas.

Ke bonon ne faris, malbonon ne baris  
ni iam, sincere ni nune lamentas,  
pardonu, ho Dio! Pro l' bono batali,  
suferi kaj venki volante, ni pentas.

16/9/1943

Antoni Grabowski.

## INFERO KAJ ĈIELO

Post longaj jaroj de l' posttomba vivo,  
dum kiuj mi studadis l' Astralujon  
kaj pensis pri l' aktivo kaj pasivo  
de l' agoj jam faritaj, halelujon  
mi kantas al la Tutmond-Arkitecto  
pro Lia granda Amo kaj protekto.

Ne lasas Li pereji per la morto  
l' animon, sed okazojn al ĝi donas  
puriĝi kaj progresi laŭ la forto  
de l' volo de l' anim', se ĝi pardonas  
la ŝuldojn, de aliaj terestuloj  
al ĝi faritajn, eĉ en akumululoj.

La teran mondon l' Astralmond' reflektas,  
sed ja en pli maldensa materio;  
surtere kion faris ni, efektas  
ĉi tie nin per sia emocio;  
l' animo trovas en si mem l' inferon  
aŭ ĉielon, aŭ ties esperon.

21/9/1943

Antoni Grabowski.

## ELREVIĜO

Dum la vivo sur la tero ĉiu homo  
revas, kaj en ĉiam pli levita grado,  
pri feliĉo ia, sub diversa nomo,  
kiun ĉirkaŭflugas lia pripensado.

Revas la junul' pri ĉarma junulino  
kaj kun ŝi pri l' ĝu' de horoj idiliaj;  
revas pri l' fianĉ' amata la knabino  
kaj pri la estontaj ĝojoj familiaj.

Multaj viroj revas pri la fam' kaj gloro,  
pri l' posedo de riĉeco l' avaruloj,  
laboristo pri la gajno per laboro,  
pri l' ĉiel' ripozplena la piuloj.

Kiom ofte tamen venas l' elreviĝo!  
Kiom ofte estas vana la espero,  
kaj la revo restas sen efektiviĝo,  
kaj anstataŭ ĝuo venas nur sufero!

Ĉar persona ĝuo estas nur ĥimero,  
se ĝi ne aliĝas al la bon' homara;  
nur la revo pri l' justec' kaj vero  
donas fruktojn, sen la elreviĝ' amara.

22/9/1943

Antoni Grabowski.

**HO DIO, VENU VIA REGNO !**

Eterna Kreanto, de l' mondoj nutranto,  
Sinjoro de l' Vivo, plej alta reganto,  
ni pentas humile, se estas utile,  
permesu ke ĉie kaj ĉielsimile  
vastiĝu la kono de amo, pardono,  
aŭdiĝu la voko de Via admono,  
fariĝu la preĝoj de l' popoloj, reĝoj  
reflektoj de Viaj ordonoj kaj leĝoj!  
Ke ĉiuj komprenu la leĝojn, eltenu  
la provojn, kaj Via Regad' al ni venu!  
Ekreĝu surtere, interne, ekstere  
Frateco kaj Amo, kaj reĝu prospere!  
Post nokto malhela eklumu la bela,  
afabla de l' suno vizaĝo fidela!  
Post tempoj amaraj, post nuboj malklaraj  
alvenu la regno de l' lumoj homaraj,  
fratec' de nacioj, la am' de ver-scioj,  
libero, tolero, la pac' de konscioj!

5/10/1943

Antoni Grabowski.

## JUĜADO DE ANIMO

Animo, de l' tero veninta astral-regionon,  
 aperis sentime, jen, antaŭ juĝistoj spiritoj.  
 Demandis ĉi tiuj: “Surtere ĉu faris vi bonon?”  
 Respondo: “Mi vivis laŭ leĝoj de l' land' ordonitaj.”

– De Dio ordonojn do ĉiujn ĉu vi observadis?  
 – “Sendube; mi kredis, ne pekis; mi pie preĝadis.”  
 Ridete respondis la ĉefo de l' just-juĝistaro:  
 “En via memoro ne brilas ja vera bonfaro,  
 ĉar ĉion faratan faradis vi nur propracele;  
 aliajn personojn neniam vi amis fidele,  
 ne helpis, ne donis konsilon, ne donis konsolon,  
 al homoj malriĉaj, malgajaj ne montris bonvolon;  
 neniam vi sentis kompaton al fremda doloro,  
 kaj kiel moralo vin regis nur ŝajna honoro.  
 Ekpentu, pensante pri ĉiuj okazoj perditaj  
 dum via tervivo, dum horoj ĝojamaj kaj spritaj;  
 el viaj deziroj nun sole homamajn selektu  
 kaj por renaskiĝi surtere, kondiĉojn elektu!”  
 L' animo ekkonis justecon de tiu juĝado  
 kaj pentis, jam preta por nova surtera vivado.

15/10/1943

Antoni Grabowski.

## KIO ESTAS LA NATURO?

Kio estas la Natur'?' demandas  
kaj kun rajto nia bona frato.  
Multaj homoj pri l' Natur' parolas,  
sed ĝi tamen restas nekonato.  
Multaj opinias, ke ĝi blinda  
ago estas de la hazardaj fortoj,  
kiujn nur regadas la neceso,  
fora de la bon' kaj de l' komfortoj.  
Sed Naturo estas laborejo  
de Spiritoj tre inteligentaj,  
kie estas ĉiuj elementoj  
de la viv' por entoj kompetentaj;  
kie trovas la kreantaj pensoj  
la necesan kre-materialon  
por estaĵoj ĉiuj senorganaj  
kaj organaj, kaj eĉ la vualon  
materian kaj astralfluidan,  
kiu vestas la spiriton puran;  
sed por krei estas ja necese  
arte regi ĉion ajn naturan.

15/10/1943

Antoni Grabowski.



## AL LA ATEISTOJ

### I

Vi, fratoj, kiuj diras ke je Dio  
ne povas kredi vi, ĉar en nenio  
sur via tero Li sin manifestas,  
ĉar se Li vere bona, justa estas,  
en la plej alta kaj perfekta grado:  
– vi la kontraŭon vidas dum vivado,  
malbonon, maljustecon kaj malveron  
venkantajn bonon, semantajn suferon,  
mokantajn pri l' justeco kaj fidelo,  
ĝojantajn pri l' milito kaj kruelo!  
Vi parte pravas, tamen vi eraras  
pensante ke, se malbonaĵojn faras  
la homoj, respondecon atribuas  
fat' al neniuj; aŭ, se iuj ĝuas  
kaj ĝojas, kaj aliaj ĝemas, ploras,  
ke justa leĝo tion ne memoras!  
Vi agnoskadas, ke la Universo,  
en kiu l' astroj estas bela verso  
de ritmaj movoj, orde kalkulitaj,  
miriĝas de la pensoj eruditaj;  
do diru: ĉu hazardo kreis ĉion?  
ĉu vi ne vidas kreaĵojn, Energion,  
movantan sin laŭ leĝ' de Forta Penso?

Kaj kiu pensas? La Spirita Menso.  
Nu, Dio estis ĉiam, kaj nun estas  
kaj ĉiam estos Tio, kio restas  
post la senigo de l' malbonaj ecoj  
en bona verko; Li ne estas pecoj  
de bono kaj justeco, sed la Tuto.  
Racio estas Lia atributo  
plej alta, kaj estaĵo kolektiva  
Li estas, ĉiam saĝa, ĉiam viva.  
En Li ni estas, eĉ se senkonscie  
kaj ĉio ja en Li ekzistas ĉie.  
La oceano estas granda maro  
de akvogutoj, kaj en la gutaro  
la akvo garas de l' gutoj l' ekziston  
samkiel Di' de l' mondoj la persiston.  
Li estas ja la Suno de l' spiritoj;  
radioj Liaj estas la kreitoj.  
Frat' ateisto, fermu la Biblion  
kaj legu la Naturon kaj Racion,  
se vi bibliajn vortojn ne komprenas,  
en kiuj vin homvortoj prave ĝenas.  
En vi mem serĉu Dion! Vi Lin trovos,  
se Ver' kaj Amo vian penson movos.

10/12/1943

Antoni Grabowski.

## AL LA ATEISTOJ

### II

Ĉu vi Unuon, la abstraktan vidis?  
Ĝin ne vidante, ĉu vi do decidis  
ke ĝi ne estas absolute, frato?!  
Ho ne! ĉar estas ĝi la postulato  
de ĉiuj nombroj, tutaj kaj frakciaj,  
samkiel Dio estas de l' raciaj  
kaj senraciaj ĉi estaĵoj l' esto:  
ĉu ne konvinkas tiu ĉi atesto?  
En ĉiuj nombroj vivas la unuo,  
kaj Di' en l' universa Evoluo.  
Lernanto faras ja erarojn multajn,  
sed korektante ilin, la okultajn  
de la scienco leĝojn li ekkonas:  
eraro korektita lin admonas  
ke li pripensu, ĉiam pli progresu  
kaj l' akiritan scion ne forgesu!  
En eta semo granda arbo dormas,  
en bonon la malbonon Leĝ' transformas,  
per kiu la Justeco disdonadas  
de l' agoj la rezultojn kaj persvadas  
l' animon erarintan, ke ĝi pentu,  
suferu, de l' justec' la pezon sentu,  
se ne en sama viv', do en alia,  
ĉar Renaskiĝ' lernejo estas dia,  
necesa por l' animoj neperfektaj  
en mondoj materiaj kaj objektaj.  
Infanoj amas ludi, ne labori;

post tempo lernas legi kaj memori;  
l' animo progresinta ne bezonas  
plu lecionojn, kiuj al ĝi donas  
pasioj kaj suferoj de la tero:  
ĝi tiam pasas al pli alta sfero.  
Ĉu ja ne bona estas tia ordo?  
Ĉu la raci' ne estas en akordo  
kun tiu ordo, kiu ĉiujn savas  
kaj fine ĉiujn vivmakulojn lavas?  
Pripensu, fratoj: la raci' kaj l' astroj  
instruas pli pri Dio, ol la pastroj.

11/12/1943

Antoni Grabowski.

## KRISTNASKA MESAĜO

En la tuta mondo la kristana rondo  
en preĝejaj festoj kaj per korespondo  
Kriston rememoras, multaj Lin adoras,  
kaj la sonoriloj en ĝojkant' sonoras.

Sed malmultaj scias, ke – se l' mond' mencias  
tiun sanktan Nomon, Lin ĝi ne konscias –  
Kristo, la Mesio de l' plej bona Dio,  
venis al la mondo, alta kun misio:

instruadi Veron, de l' spirit' Liberon,  
al ĉiela vivo similigi Teron.  
Per naskiĝ' humila, per labor' utila,  
per la granda amo, per instruo brila

montris Li la vojon por atingi ĝojon  
veran, kaj forlasi jam la lastan fojon  
dubojn kaj eraron, de l' malbon' la maron,  
kaj per sinofero servi la homaron.

Estu la instruo viva de Jesuo  
klara vojo al la homa evoluo  
de infano plora al la vir' labora,  
de la mort-elspiro al Spirito glora!

25/12/1943

Antoni Grabowski.

## PASKA MESAĜO

Kiam proksimiĝas ree paskaj tagoj,  
la kristanajn korojn vundas pentosagoj;  
oni rememoras pekojn kontraŭ Dio  
kaj la doloregan morton de l' Mesio;  
sed en ĝojon baldaŭ ŝanĝas sin la pento,  
ĉar la Krucumito glorie venkis Morton  
kaj al ni promesis la plej bonan sorton  
en ĉiela regno, homa se l' animo  
Lin konfesos krede, kun konfid', sen timo.  
Pentu pro la krimaj pekoj, ho homaro,  
ĉar de ili plenaj estas ter' kaj maro!  
De kruel-besteco brulas fajra flamo,  
ĝemas sur la kruco la Frateca Amo.  
De la kruc' deprenu ĝin, ho bonaj koroj,  
ke ĝi reviviĝu post la mort-angoroj.  
Sen la frata Amo tuta mond' pereas,  
nur Frateco Pacon sur la tero kreas.

27/3/1944

Antoni Grabowski.

## KIAL VI PLENDAS?

Kial vi plendas, se l' Fato sendas  
al vi suferon, kiam atendas  
vi ĝojan pacon kiel donacon,  
sed nur ricevas ploron kaj lacon?  
Ĉu vi ignoras, kial doloras  
kion l' esperon, koron traboras?  
Granda la koro, malgraŭ angoro,  
se ĝi kontenta post la laboro  
de sia faro por la homaro  
sentas mielon eĉ en amaro.  
Ne decas plendi, faton ofendi  
kaj siajn ŝuldojn karmajn defendi.  
Juste la Leĝo, malgraŭ la preĝo,  
regas pli forte ol ĉiu reĝo.  
Ĉiu malbono, bono kaj kono  
de l' malriĉul' , aŭ gloro de l' trono,  
ĝuo aŭ larmo, estas de l' Karmo  
debet' , kredito, puno aŭ armo.  
Nek ĝojtrezoron, nek fatfavoron  
esperu, kaj ne timu doloron!  
Faru la devon, ŝatu la revon,  
de l' fat' atendu justan ricevon,  
laŭ karma konto, eĉ sen volonto,  
en nuna vivo, aŭ en l' estonto.

29/12/1943

Antoni Grabowski.

## KIAL PREĜI?

“La karma Leĝo, malgraŭ la preĝo  
 regas pli forte ol ĉiu reĝo.”  
 Tiel mi diris, kaj vi deziris  
 ke mi ekspliku, ĉu mi disŝiris  
 tiel la pian kaj religian  
 fidon al preĝo, tre tradician?  
 Ne, mia frato; ĉar se la fato,  
 malgraŭ la preĝo, nur postulato  
 estas de l’ agoj, ĝiaj justpagoj  
 ankaŭ rilatas al mens-imagoj,  
 al homaj sentoj, al veaj pentoj  
 kaj al la venko super la tentoj.  
 Preĝo influas, sed ne detruas  
 kion la Karmo justa konstruas.  
 Preĝi ne ĉesu, sed ne forgesu  
 ke ne sufiĉas, ke vi promesu  
 puriĝi vere, sed ke sincere  
 tion plenumu, kaj malfiere!  
 Preĝu kaj kredu, al pek’ ne cedu,  
 por havi bonon, bone procedu!  
 “Ne decas plendi, faton ofendi  
 kaj siajn ŝuldojn karmajn defendi.”

30/12/1943

Antoni Grabowski.





*João da Cruz e Souza,*  
 brazila ŝtatoficisto, naski-  
 ĝis en Ŝtato Sankta Kata-  
 rina en 1862 kaj mortis en  
 1898. Ido de sklavoj, negro, li tamen estis genia poeto kaj  
 pensulo ĝis nun tre estimata en Brazilo.

## AL LA KARAJ FRATOJ ESPERANTISTAJ

### I

El la regno de la ombroj venas  
 mi al vi, ho karaj ide-fratoj,  
 suferantoj kaj persekutatoj,  
 kiujn fat' severa peze ĉenas.

Vi rigardu kiel morte svenas  
 jam la mondo de la renegatoj  
 de Jesuo, kiuj nun sub batoj  
 de l' justeco dia sin malbenas.

Kio restas el la falsa gloro  
de l' mortanta civilizacio  
sen amanta kristancec' de l' koro?

Kion kreas materi-scienco?  
Ruinaĵojn nur, se ĝi sen Dio  
konstruadas, kaj sen konscienco.

4/7/1943

João da Cruz e Souza.

## II

Sen konscienco vivi sur la tero  
kaj sin vuali en la egoismon  
signifas fali certe en abismon  
malluman de postmorta korsufero.

Ho! vana estas ĉiu sav-espero,  
se malvarmega kredo faras skismon  
de la karito kaj la kristanisman  
kripligas per milita glav' el fero.

Surtera vivo estas ja batalo  
de la spirito kontraŭ la fatalo  
de l' tentoj de l' malbono kaj malvero;

feliĉa estas kiu, batalante  
per am-armiloj kaj sin mem venkante,  
triumfe venos al la luma sfero.

4/7/1943

João da Cruz e Souza.

**AL LA KARA FRATO ISMAEL GOMES BRAGA**

dediĉas João da Cruz e Souza

Denove venas mi, jen, kun soneto  
en la belsona lingvo Esperanto,  
taŭganta por la verso kaj por kanto,  
estante bona ilo de l' poeto.

Mi venas kiel spirita frateto  
por diri al la firma batalanto  
por ver' kaj kontraŭ iluzia vanto:  
“Vin ne timigu de l' skeptik' rideto;

“Vin ne timigu de l' dubantoj krio,  
“nek ajnaj malhelpantaj embarasoj.  
“Antaŭen, frato! Kun konfid' je Dio!

“Laboru por fratec' de ĉiuj rasoj,  
“de ĉiuj homaj landoj kaj nacioj;  
“vin helpos de l' Ĉiel' la simpatioj.”

6/7/1943

## REMEMORO

En mia lasta vivo sur la tero  
mi estis negro, fil' de sklav' humila;  
la vivo estis por mi malfacila,  
eĉ kiam mi vivadis en libero.

Dum miaj pezaj horoj de sufero  
revadis mi pri fato malsimila,  
kaj tiaj revoj igis maltrankvila  
la koron, proksiman al malespero.

Postmorte venis al mi la ekkono  
de l' kaŭzo de l' sufero, ĉar la agojn  
antikvajn vidis mi, kaj la repagojn.

Pagante ŝuldojn, venas la pardono;  
kaj dolĉa estas ĉiu rememoro  
de ĝoj' vivita kaj pasinta ploro.

9/7/1943

João da Cruz e Souza.

**ANIMO LIBERA<sup>(\*)</sup>**

Singulto ĝoje ĉarma de magio  
 trakuras la spiriton en dizerto  
 for de l' katenoj pezaj de l' dezerto  
 de l' mond' de ombroj kaj de agonio.

Libera la anim', kun ĝoj-ebrio  
 forgesas la dolorojn de l' malcerto  
 pasinta kaj mergiĝas en koncerto  
 de novaj, lumaj mondoj de vizio.

L' anim' libera, jam savita, pura,  
 l' aŭronon vidas post la nokt' obskura,  
 per admirinda rigardad' interna;

pentras la mondon de l' senmorteco,  
 ĉe kantoj de lumbril' kaj libereco,  
 tra la pordegoj de l' belec' eterna.

10/7/1943

João da Cruz e Souza.

---

(\*) Tiu ĉi soneto kaj kelkaj aliaj aperis unue en la portugala lingvo, ricevitaĵ de la mediano Francisco Cândido Xavier; nun la Spirito mem tradukis ilin kaj diktis en Esperanto al la mediano F. V. Lorenz.

## **PRI LA VIVO DE LA SPIRITOJ**

Vi, homoj, volas scii kion faras  
l' animoj, de l' terkorpoj disigitaj?  
Ĉu ili dormas, aŭ ĉu la benitaj  
al Dio pie kanti malavaras?

Amikoj, aŭdu kion mi deklaras:  
En niaj sferoj vane tiaj mitaj  
ideoj serĉiĝadus, ĉar spiritaj  
agadoj sur pli bonaj bazoj staras.

L' animoj devas lerni kaj progresi:  
ni lernas sanktajn diajn leĝojn koni,  
puriĝi, ami, helpi kaj pardonni,

malbonojn ricevitaĵn plenforgesi;  
riproĉoj konsciencaj nin purigas,  
sincera pent' al Dio nin alligas.

25/7/1943

João da Cruz e Souza.

**NE PLENDU!**

Ne plendu, ho amiko, ke sufero  
fariĝis cia ĉiutaga pano;  
ne plendu ke malvarma uragano  
velkigas al ci florojn de l' espero.

Sufero estas leĝ' de l' nuna tero  
por kresko de l' animo de l' kristano,  
necesa kiel la aer' por sano  
kaj kiel la laboro por prospero.

Sufer-elteno estas prova ŝtono,  
pruvanta de l' anim' la puran oron;  
per pacienco, amo kaj pardono,

sen plendi, plibeligu cian koron  
kaj ĝin oferu, kun la preĝ' de l' faro,  
de l' pura Idealo sur l' altaro.

1/8/1943

João da Cruz e Souza.



## MIGRADOJ DE L' ANIMO

Ne scias la plimulto de l' homaro  
ke Vivo estas spir' de l' Dia Kre';  
tre multaj mensoj, ĉu pro kulp' aŭ ne,  
eraras kaj persistas en l' eraro,

pensante ke netrairebla baro  
ekzistas inter morto kaj ide';  
kaj eĉ postmorte iuj dubas tre  
pri la reveno al la ter-scenaro.

Sed ĉiuj, kies mensoj vidas klare,  
komprenas ke post nokto tago venas,  
kaj renaskiĝ' post morto rekatenas,

ĝis levos sin l' anim' al Di' memstare  
kaj, de la egoismo purigite,  
eniros lumajn sferojn, memmerite.

1/8/1943

João da Cruz e Souza.

## KION INSTRUAS LA MALBONO

“Se mi sciuz, kie ja loĝadas Dio”,  
 diris iu animeto sen plensaĝo,  
 “kurus mi al Li rapide, kun kuraĝo,  
 “kaj mi Lin humile petus pri ĉi-tio:

“Ke forigu la Tutpova Energio  
 “el la mond’ malbonon, kaj el ĉiu aĝo,  
 “kaj ke estu anoncata la mesaĝo:  
 “– La malbon’ pereis – al la homsocio.”

Mi respondis: “Via volo, kara frato,  
 “estas bona, tamen, via dezirato  
 “tre eraras, ĉar racio nin instruas,

“ke malbono ĉiu sin per si detruas,  
 “kaj dum ĝi aperas, ĝi avertas nin  
 “ke ni mem en bonon transformadu ĝin.”

2/8/1943

João da Cruz e Souza.

## LA TROMPIĜO DE L' SINMORTIGINTOJ

Bedaŭrinda estas tiu homanimo,  
kiu la fadenon de la terekzisto  
trancis propravole, ĉu pro malpersisto  
en sufero, ĉu pro falsa hont' aŭ timo.

Respektinda estas l' intermonda limo,  
kiun gardas ja la mortanĝel'-pordisto,  
obeanta la ordonojn nur de Kristo;  
propravole ĝin transiri estas krimo.

Trompas sin l' animo, kiu malesperas:  
el la korp' fuĝante, ĝi sin mem liveras  
al daŭrigo de la suferad' amara,

kiun ĝi elteni sur la ter' ne volis;  
ĝia ago la fatpezon ne abolis,  
prokrastiĝis nur la pago sort-ripara.

4/8/1943

João da Cruz e Souza.

**SE VI VOLAS...**

Se vi volas ke feliĉo de l' etero  
venu al vi el la mond' nelimigata,  
estos vi surtere fil' nekomprenata  
de l' Turmento edziĝinta kun Mizero.

Vivos en domaĉ' malgaja de l' Sufero,  
de l' Ĝemado, de l' Doloro senkompata;  
de l' monduma ĝu' vi estos forgesata,  
vundoplena, dua Ijob sur la Tero.

Kaj vi estos ĉe la homoj fiaborto,  
de la amarecoj kaj de l' malkomforto,  
arestita en malliberejaj kradoj;

Sed je iu tag' la pordoj el bril-oro  
al vi malfermiĝos kaj de l' lum' trezoro  
de l' eternaj, feliĉegaj Di-benadoj.

4/8/1943

João da Cruz e Souza.

## NIA MESAĜO

Mesaĝon ĉi pri l' vivo kaj espero  
ni el la mondo senmorteca sendas  
al la homaro, kiu ĝin atendas,  
lekcion lumigantan pri la vero.

La voĉon el la Promesita Tero  
aŭskultu, ekzilitoj, kiuj plendas;  
jen kun ondet' lumanta ni etendas  
al vi la brakojn el lumplena sfero.

Laboro nia tuta en vi celas  
firmigi kredon, kiu ne ŝancelas  
sur via vojo de la prov' dolora.

Ke vi venkadu la ŝanĝeman sorton,  
amante virtojn, aŭdu nian vorton  
pri l' releviĝoj de l' animo glora.

4/8/1943

João da Cruz e Souza.

*K.* Pri tiu ĉi poeto ni nenion povas diri nun. En estonta eldono de tiu ĉi libreto, ni mem aŭ niaj posteuloj diros ion.

### **KIAM VENOS HELA TAGO?**

Nigra nokto nubinunda.  
 Vintra vento boje blovas,  
 veajn versojn fajfe dormas  
 ronkajn rimojn hundoj hurlas.  
 Nokt' inundas nun naciojn;  
 fi-fier-furioj fulmas,  
 kanonpafoj tondre trafas,  
 tero en detruo dronas.  
 Ĉu ĉi tagoj de turmentoj  
 venis veki el dormado  
 la animon de l' homaro,  
 veki ĝin al vera vivo?  
 Ĉu l' ĉiel' la nigrajn nubojn  
 fordispelos per doloroj,  
 kaj komencos fine fidi  
 homoj al la ben' de l' bono  
 kaj kreiĝos nova mondo  
 kun konkerroj de l' kor-kredo?

20/6/1944

*K.*

## PACIENCO

Vokas voĉ' de vivaj vortoj,  
vibras vok' en vaga vento:  
Kien kuris firmaj fortoj  
de koram' kaj sankta sento?

For disflugis fidofloroj,  
militmonstro mondon mordas,  
de l' maldolĉaj dubdoloroj  
la korkordoj ne agordas.

Ĉu l' ĉiela Dio dormas,  
veon nian ne vidante?  
Ŝanceliĝas ŝip', ĉar ŝormas,  
move muĝas mar', ŝaŭmante.

Luktu ni, sen lac' laboru,  
firme, fajre, fratoj,  
venki penu, ne veploru,  
eĉ se pluvus fataj battoj.

Fabelforto fepotenta  
povas tegi tutan teron:  
estas lukto pacienca,  
ne perdanta la esperon.

14/7/1944

K.

## DU GLORAJ DATOJ

Je l' dekkvara tago de Julio  
memorigas nin la Historio  
pri du datoj, ambaŭ vere gloraj:  
pri l' naskiĝo de l' revolucio  
de liberamanta la nacio,  
kun eventoj gravaj, sed doloraj;  
tiu dat' al Eŭrop-okcidento  
nin transportas, en la mens' kaj sento,  
kie falis malliberaj muroj,  
de l' tiranaj rajtoj kaj torturoj.  
Pasis poste preskaŭ jam jarcento,  
kiam en Eŭropa Oriento,  
ankaŭ je l' dekkvara de Julio  
duan daton la Mond-Historio  
skribis per idealisma mano  
tre modesta de spirit-titano,  
alportante al la mond' donacon,  
tre kapablan enkonduki pacon  
en internaciaj vivrilatoj.  
Dank' al Fat' pro ambaŭ tiuj datoj!  
Vivu Esperanto, la mondpaciganto!

14/7/1944

K.





*Lazaro Ludoviko Zamenhof*, naskiĝis en Bialystok en la 15<sup>a</sup> de Decembro 1859 kaj mortis en la 14<sup>a</sup> de Aprilo 1917 en Varsovio. Profesie li estis kuracisto, okulisto. Aŭtoro de Esperanto, kies unuan libron li eldonis, kiam li estis 27-jara, li daŭrigis la laboradon por Esperanto, ĝis sia morto. Vere geniaj estas liaj tradukaĵoj de famaj verkoj de la mondliteraturo: *La Biblio*, *Ifigenio en Taŭrido*, *Hamleto*, *Rabistoj*, *Revizoro* k. a.

Liaj originalaj poemoj estas simplaj kaj parolas rekte al la koro de la leganto.

## AL LA SAMIDEANO ISMAEL GOMES BRAGA

Amiko kara, certe vi tre miras,  
ke mi ne donis mem al vi mesaĝon;  
sed ofte, kvankam oni deziras,  
neeble estas fari, eĉ kuraĝon  
havante, pri kio oni sopiras.

Por komuniki sin, ĉiu spirito  
taŭgantana mediumon devas trovi,

fluidoĵ kies en perispirito  
bezonas kun la liaj sin kunmovi  
kaj ligi, laŭ la konvenanta rito.

Nu, ĉar mi la kondiĉojn ne trovadis,  
ĝis nun ne povis mi min manifesti,  
kaj kvankam ofte mi pri vi pensadis,  
la penson mi ne povis klaratesti;  
kaj mi pro tio ofte suferadis.

Parolojn kelkajn skribi surpapere  
hodiaŭ estas al mi permesate,  
kaj diri al vi, ke mi ŝatas vere  
laborojn viajn, kiujn nevenkate  
por Esperanto faras vi sincere.

Mi dankas vin por l' diligentaj agoj  
kaj propagando sur Brazila tero;  
kaj Dion petas mi, ke la imagoj  
de via mens' fariĝu, kun prospero,  
baldaŭa efektivo de l' espero.

6/8/1943

Via

L. L. Zamenhof.

## AL LA ESPERANTISTARO

Karaj fratoj, kore salutante vin,  
venas mi por pruvi la ekziston  
de l' animo post la korpa morto,  
se akceptos vi mesaĝon mian,  
kaj ne dubos pri la identeco.

Koro mia suferadis multe  
kiam la unua mondmilito  
pacesperojn ekatakis tiam,  
kiam niaj fortoj ŝajnis kreski.  
La malamo inter la popoloj  
kreis teruregan hekatombon;  
dum kvar jaroj fluis homa sango  
kaj detruorgioj furiozaj  
silentigi tentis nian lingvon.

Venis paco kun esperoj novaj,  
rekomencis Esperanto flori.

Sed mallonge daŭris la printempo,  
ne lasante eĉ someron veni,  
kaj tempesto nova sur la teron  
detruadon realportis ĉie.  
Venĝemege staras la popoloj  
de l' terakva mondo tuta  
sangsoife en batalaj kampoj,  
forĝesinte la homaranismon.  
Unuflanke altaj idealoj,  
duaflanke sklavigist-armeoj.

Kia vid' malĝoja por ni ĉuj:  
vi, en korpoj densaj sur la tero,  
ni, spiritoj en la terproksimoj,  
tremas kaj al Dio pie preĝas,  
ke Li baldaŭ donu repaciĝon.  
Ne nur pro l' sufero de la miaj  
mia kor' doloras amarece,  
sed al la doloro tiuspeca  
unuig'as la malĝoj' profunda,  
emananta el la pura amo  
al la tuta homa familio.  
Sed ne malesperu, karaj fratoj!  
Baldaŭ venos dezirata paco,  
kaj la venko de l' falangoj bravaj  
de la batalantoj pro la sanktaj  
idealoj remalfermos ĉie  
de l' printempaj floroj la burĝonojn,  
kaj ĝojkantoj ĉie reeksonos.

7/81943

L. L. Zamenhof.

## KELKAJ PAROLOJ

Al mia Amiko tre bona kaj kara,  
por kiu mi ĉiam dankeme volas  
la Forton Misteran humile preĝi,  
ke Ĝi lin benante tra l' vivo surtera  
konduku al l' efektivigo de l' altaj  
kaj noblaj de l' luma amokor' idealoj,  
denove mi skribas, per man' de alia  
amiko, ĉi tiun mallongan mesaĝon:

“Ne dubu, amata animo, pri l' fakto,  
ke mi efektive al vi nun parolas.  
Ne pensu, ke song' estas kion vi legas,  
ĉar Vorto fariĝas ĉiame surtere  
en tempo matura, videbla korpiĝo!  
La temp' estas plene matura por multaj,  
kaj, kiu preparis l' orelojn por aŭdi,  
ekaŭdu do kion parolas l' animoj,  
el tera lernejo pasintaj al lokoj  
pli altaj, sed ne jam al plena Nirvana:  
L' ideo kunigas nin ĉiam fortege  
kun via ideo, se ĝi simpatie  
aliĝas, kaj tial la samideanoj  
en tuta la monduniverso sin trovas,  
eĉ malgraŭ ke mort' ilin foren disigis.”

3/9/1943

L. L. Zamenhof.

**VENOS LA TAGLUMO!**

Regas denove nokto sen luno  
kaj subpremadas liberon;  
ĉiuj popoloj ĝemas, ke l' suno  
ree lumigu la teron.

Al la potenca Forto Mistera  
preĝoj leviĝas kun ploro,  
ke jam finiĝu tiu surtera  
hombuĉegad' kaj Doloro.

Regas ankoraŭ nokto sen luno,  
nobla homamo dormadas;  
tamen leviĝos baldaŭ la suno,  
ĝi jam tra l' nuboj, jen, vadas!

Tra la mallumo brilas la celo  
hela de niaj laboroj;  
ilin protektos l' alta ĉielo,  
kiel esperas la koroj.

15/9/1943

L. L. Zamenhof.

## VIZIO DE L' ESTONTECO

En astrala sfero estas regiono,  
kie vidas la spirit' l' efektiviĝon  
de la idealoj, kiujn lia menso  
nutris dum la viv' ankoraŭ sur la tero.

Iutage tien ankaŭ mi eniris  
kaj ekvidis homojn el nacioj ĉiuj,  
kunirintajn kaj kreantajn la projektojn  
pri leviĝo de l' feliĉo de l' homaro.

Ĉiuj klasoj de laboro kaj de studoj,  
de komerco kaj de arto paroladis  
en nur unu lingvo, kun amplenaj vortoj,  
siavice pri l' konkerroj atingitaj  
kaj pri la ankoraŭ baldaŭ atingotaj.

Eŭropanoj, Azianoj kaj loĝantoj  
de Afriko, Ameriko, Aŭstralio  
interkompreniĝis ĉiuj kaj preparis  
bonajn leĝojn de frateca kunvivado,  
harmonia kunlaboro ĉiam-paca,  
pri la vivrimedoj sur la ter' necesaj.  
Anĝelĥoro kantis, ilin aprobante,  
kaj mi preĝis: “Donu Di’, ke Idealo  
tiu ĉi surtere baldaŭ realiĝu! “

23/9/1943

L. L. Zamenhof.

**HO MIA KOR'!**

Ho mia kor', nun batu jam trankvile,  
jam proksimiĝas la feliĉa hor',  
en kiu povos spiri mi facile,  
ho mia hor'!

Ne mortis ĉiuj ĝerموj de l' semado,  
aperas jam la fruktoj de l' labor';  
sufiĉas! trankviliĝu en batado,  
ho mia kor'!

Revenas en la mondon nova sento,  
de l' malliber' la birdoj flugas for;  
ekĝoju pro la grava do evento,  
ho mia kor'!

27/9/1943

L. L. Zamenhof.



## LECIONO DE FRATECO

Bone diris ja spirito estiminda,  
kiu gvidas la Brazilan kredantaron:  
“Esperanto estas leciono inda  
de frateco, kiu savos la homaro.”

Sen frateco certe la homar’ pereus,  
ĉar malamo ne konstruas, sed detruas;  
sen fratec’ popoloj nur malamon kreus  
kaj ruinojn, kiel histori’ instruas.

En plej altaj spiritsferoj ja parolas  
ĉiuj unu solan lingvon, ĉar la pensoj  
transsendiĝas, kiam la spiritoj volas,  
el ajn-iu menso al aliaj mensoj.

Sed en malpli altaj sferoj la spiritoj  
uzas tiujn lingvojn, kiujn sur la tero  
ili uzis dum la pac’ aŭ dum militoj:  
tie do utilis l’ Esperant-afero.

Al Emmanuel’ mi dankas tre sincere  
pro la granda helpo, pro la intereso  
kaj la kunlaboro, tre utila vere  
por la frateco de l’ popoloj kaj progreso.

4/10/1943

L. L. Zamenhof.

**RESPONDO AL NE JUSTA KRITIKULO**

Ne pensis mi respondi la “kritikon “  
de l’ homo, kiu diras, ke la lingvo  
farita arte, kun la cel’ humana,  
jam mortis kiel venko de l’ naturo;  
sed kiel diris unu el l’ amikoj,  
respondi oni devas, se utile  
por bono de l’ afero sankta estas.  
Do mi memorigante la laborojn  
de la samideanoj faraditajn,  
demandas: “Ĉu la lingvo Esperanto  
ne konas la doloron, dramon, ĝojon,  
esperon, lukton, stilon, belajn verkojn?  
Ĉu ĝi aspekton havas nenaturan?”  
Ho, vi amikoj, kiuj bone scias,  
ke nia lingvo vivas, kreskas, sentas,  
internan senson kaj ideon havas,  
decidu mem, ĉu tiu kritikisto  
la rajton havas tiel nin ofendi?  
Pardonu lin estonta la homaro:  
ĉar li ne sciis, ke li tre eraras.  
Vivadas kaj vivados Esperanto,  
trezoro ja neelĉerpeble riĉa  
de sentoj, pensoj, laŭnatura arto!

17/10/1943

L. L. Zamenhof.



*Stanislav Schulhof*, dentkuracisto, naskiĝis en Lipka en 1864 kaj mortis en Pardubice en 18-8-1919. Ĉeĥa verkisto kaj fervora esperantisto. Li lasis tri volumetojn de poezioj en Esperanto kaj komencis grandan epeon, kiun la morto interrompis.

## ANKAŬ MI VOLAS KUNLABORI

Dum longa tempo mense enmergite  
 en ondojn de memoro, tre diversajn,  
 je iu tago aŭdis mi subite  
 parolojn klarajn, kaj eĉ frazojn versajn  
 en lingvo, kiun ŝatis mi surtere:  
 En Esperanto, la ligil' benita  
 de la nacioj, kiujn fat' mistere  
 disigis per malam-ide' milita.

Ekĝojis mi, aŭdinte en ĉi sfero  
paroli tiun lingvon de l' homaro,  
ĉar renaskiĝis en mi la espero  
post terurigaj pensoj de amaro.  
Humile volas ankaŭ mi labori  
por la proksima venko de la Bono;  
ne estas tempo nun por plendi, plori,  
sed por konstrui jam per ŝton' post ŝtono  
pli altan homan civilizacion,  
pli puran, kun amcel' , kulturon,  
kunigi harmonie la racion  
kaj koron, kaj kun l' arto la naturon.

30/12/1943

Stanislav Schulhof.

## HIMNO AL LA LABORO

Post nokta ripozo alvenas l' aŭroro;  
salutas la tagon de birdoj la ĥoro;  
vekiĝu, jam venis la hor' de laboro!  
En tempo antikva ne estis honoro  
labori; nur sklavoĵ por sia sinjoro  
kulturis la kampojn, la minojn de oro;  
kaj li nur ĝojadis pri sia trezoro,  
la sklavoĵn mastradis kun granda rigoro,  
militon kulturis kun varma fervoro,  
batalis por venĝo, por rabo kaj "gloro",  
al Dio dankante pro l' venk' kaj favoro.  
La tempoj ŝanĝiĝis, kun ili la moro,  
ĉar pacan laboron preferas la koro  
de vera kristano; milita teroro  
nuntempe nur kvazaŭ la morta angoro  
teruron dissemas kun vea doloro;  
ne havas plu benon, la dian, pulvoron.  
Laboro, de l' nova kultur' la faktoro,  
beniĝu; ĝin kantu la am-trobadoro,  
kiel li kantadis pri l' dolĉaodoro  
de l' floroj kaj ĉarmoj de l' bela koloro.  
Laboro nun estu de l' viv' la dekoron!

4/1/1944

Stanislav Schulhof.

## HIMNO AL LA VIVO

Eterne persistas kaj regas la Vivo,  
senlima en temp' kaj en spac-perspektivo;  
sonĝe ĝi dormas en ŝton' kaj oro;  
sonĝadas agrable en frukto kaj floro;  
ĝi mem ekvekiĝi en bestoj intencas,  
kaj sin manifesti en homoj komencas  
kaj sin etendadas al mondoj anĝelaj,  
en sferoj sennombraj, tre lumaj kaj belaj.  
Eterne ekzistis kaj estos la Vivo,  
de l' Dia Kreado la nobla motivo.  
La morto nur estas de l' Vivo transformo,  
simila esence je l' stato de dormo,  
dum kiu l' animo la teron forgesas,  
pri l' korpaj objektoj sin ne interesas.  
Ne perdas estulo la vivon, mortante,  
kaj ankaŭ ne trovas l' Inferon de Dante;  
sed kiel la homo malnovan vestaĵon  
pro nova ekŝanĝas, li faras la paŝon  
el ĉambro en ĉambro, ŝanĝante la vestojn,  
sed li konservadas la sentojn kaj gestojn,  
memoron kaj pensojn de l' vivo surtera  
kaj sin preparadas por vivo etera.

5/1/1944

Stanislav Schulhof.

## FELIĈAJ ESTAS LA MALRIĈAJ EN SPIRITO

(Laŭ la Evangelio, S. Mateo, 5<sup>a</sup> Ĉapitro)

En la ĉielregno estos tre feliĉaj  
 la animoj, kiuj sentas sin malriĉaj <sup>(\*)</sup>  
 de la vera Scio, ĝian panon petas  
 kaj la ricevitajn pecojn ne forĵetas,  
 sed pro ili dankas en la nom' de Dio,  
 ne trompate de l' riĉeca iluzio  
 de la materialisma hipotezo,  
 malproksima de la granda ver-sintezo.  
 Se hodiaŭ ili ploras kaj suferas,  
 ili konsoliĝas kaj ne malesperas,  
 komprenante de la Karmo la justecon  
 kaj de ĝia funkciado ĉian specon.  
 La justecon malsatante, soifante,  
 ili kompatadas, homojn pacigante;  
 ĉiam justaj kaj pacemaj, kore puraj,  
 ili Dion en mirakloj, la naturaj  
 vidos, kaj pro siaj agoj karitataj  
 ili estos filoj ja de Di'nomataj.

9/1/1944

Stanislav Schulhof.

---

(\*) En greka originalo *ptohoj* = almozpetantoj.

## INSTRUADO DE LA HISTORIO

Kiam mi ankoraŭ vivis sur la tero,  
min proksimigante je l' disiga tago,  
volis mi priskribi, en eposaj versoj,  
la plej gravajn, lastajn histori-eventojn,  
Esperanto-lingve, por la posteuloj.  
Sed efektiviĝi tion mi ne povis,  
ĉar Parcoj, laŭ decido de la Fato,  
tranĉis la fadenon, kiu mian koron  
kunligadis kun la tervitala forto.  
En alian vivosferon transirinte,  
trovis mi aliajn interesindaĵojn  
kaj ekkonis ja, ke la progres' homara  
deflankiĝis for l' celo providenca,  
ĉar anstataŭ agi por la Eterneco,  
perdas sin la homoj en la egoismaj  
kaj detruaj ondoj de l' bruanta maro  
de pasioj blindaj, kiujn ambicio,  
avideco kaj memamo produktadas.  
Ĉu la ĉarme bela kanto de Homero  
pri la detruo de la fama urbo Trojo  
vekis en la homaj mensoj la komprenon,  
ke malbonaj agoj nur malbonajn fruktojn  
alportadas dum la kuro de la tempo?  
Ĉu l' homaro lernis kaj komprenis ion  
el la civilizacio Babilona?  
el la bril' kaj falo de la imperioj  
Persa, Egiptuja, Roma kaj aliaj?  
Vane oni diras, ke la Historio



instruisto estas de la homsaĝeco.  
Vere ĝi instruas, sed malmultaj volas  
sekvi la konsilojn bonajn en la vivo!  
Homoj kaj nacioj, lernu la instruon,  
kiun al vi donis la Spiritoj noblaj:  
Konfucio, Budho, Jesu-Kristo, sanktaj  
Misiistoj de l' Saĝec' kaj Amo Diaj!  
Kion ili faris dum la tera vivo,  
ne perdiĝis en la ondoj de la tempo,  
sed daŭradas kaj daŭrados ĝiseterne,  
ĉar la Vero estas neperea Vivo.  
Velkas baldaŭ ĉiu famo militista,  
post la morto estingiĝas ĝia gloro;  
sed la Vortoj de la Diaj Misiistoj  
sonas, lumas kaj ĝojigas la animojn,  
kiujn ili nutras kiel pan' de vivo.

11/1/1944

Stanislav Schulhof.

## ESPERANTO

Kiam la terglobo ĉiujn regnopordojn  
ekmalfermis al komerc' kaj al scienco,  
kaj ekbrilis sur l' espera firmamento  
de l' homar' la stelo de la frata amo,  
naskiĝis l' ideo de komuna lingvo  
helpa kaj neŭtrala por nacioj ĉiuj.  
Multaj estis la projektoj, sed nur unu  
disvastiĝis, sub standardo de l' Espero,  
kombinante teorion kun praktiko,  
arton kun naturo, verko vivopova,  
konstruita firme de aŭtor' modesta:  
Esperanto, glora verko Zamanhofa.  
Kio estas vaporŝipoj por la maro,  
telegraf' kaj lum' elektra por la tero,  
poŝto kaj ĵurnaloj por la informado,  
Esperanto estas por la kunfratiĝo  
de l' nacioj, la pacama komprenilo.  
Ĝi elkreskis ĝustahore el neceso,  
kulture de l' plej pura altruismo;  
ĝi ne velkos, malgraŭ la tempest-furioj,  
sed vivados por la bono de l' homaro.  
Dankon, Zamenhof, al vi la mondo ŝuldas.

17/1/1944

Stanislav Schulhof.

## SPIRITA HEROECO

Dum miaj promenadoj en la lando  
spirita de l' krepusko mi renkontis  
amikon el surtera mia vivo,  
kaj jenon li pri si al mi rakontis:  
– Surtere mi vivadis tre malĉaste;  
la veran amon mi neniam sentis,  
iĝante nur ludilo de l' pasioj;  
pro la malbonaj agoj mi ne pentis;  
minutojn mi por ĝui, ofte verŝis  
mi en la purajn korojn de knabinoj  
venenon de l' falseco kaj sufero,  
mokante pri iliaj halucinoj.  
La malĉastec' venenis fine ankaŭ  
de mia korp' la fortojn; venis morto,  
mi ŝanĝis la loĝejon, sed daŭrigis  
pensadi ĉiam je l' amora sporto.  
Mi sentis min resanigita, forta  
re-altirita al la seksplezuroj;  
en mia menso la kutim-imago  
pentradis scenojn de amor-figuroj;  
la scenoj ŝajnis al mi realaĵoj,  
mi sekvis ilin blinde kaj enfalis  
en lagon de malpura, marĉa akvo,  
en kiu min mallumo ekvualis.  
Anstataŭ la vizioj de l' feinoj  
ekvidis mi la ombrojn de la ranoj  
kaj bufoj kaj kadavroj putriĝantaj,  
kun membroj disrodantaj per malsanoj.  
Soifo min turmentis, sed la akvo  
min naŭzis, kaj mi, ĝin trinkinte, vomis;  
kaj de la konscienco la riproĉoj

min mordis, kaj la kulpoj ekfantomis.  
Mi volis ja eliri el la lago,  
sed ĉiupaŝe pli profunden falis,  
ĝis nur la kapo superakve restis,  
kaj kontraŭ dron' senlace mi batalis.  
“Ha! tial mi forlasis la tervivon”,  
mi diris, “ke mi mortu duafoje,  
en ĉi malpura akvo! Dio, helpu!”  
Kaj mi, tremante, ploris tre malĝoje.  
Timego min atakis, ke mi dronos,  
sen helpo, ĉar mi estis tie sola ...  
Sed jen! aperis milda lumradio,  
kaj al mi ekparolis voĉ' konsola:  
“Amata filo! savi vin mi venis,  
ĉar mia koro aŭdis vian vokon;  
mi petis Dion, kaj permeson havas  
malsuprenveni en ĉi tiun lokon.”  
– Patrino! amata! – plore mi respondis,  
– vi venas certe el ĉiela sfero,  
eltiri min el ĉi malpura akvo  
kaj savi min el tiu malespero.  
Ho, kion devas fari mi, patrino,  
ke mi eliri povu sur la bordon?  
“Promesu, filo, ke vi nun, pentante,  
obeos firme la Diecan Ordon,  
kaj tiu Ordo estas vera Amo  
al ĉiuj homoj kaj al ĉiu Bono;  
ĝi deziras ke vi kunlaboru  
kun ĝi per bonaj agoj kaj pardono.”  
– Patrino, mi promesas, – mi respondis  
kaj tuj mi sentis ke mi jam eliris  
el la malpura akvo sur la bordon;  
mi dankis Dion, kaj la panjo diris:  
“Vi jam savita estas; sed aŭskultu!  
Alia homo ĝemas en la lago;

nun pruvu kion vi promesis vorte,  
nun pruvu tion per boneca ago!  
Eniru ree en la saman lagon,  
alproksimiĝu al la hom' dronanta,  
etendu al li vian helpan manon,  
ke li eliru al la bord' savanta.”  
Mi tuj eniris en la saman lagon,  
mi paŝis al la malfeliĉa homo,  
mi jam etendis al li mian manon,  
kaj mi rekonis lin kaj lian nomon:  
Li estis mia granda malamiko;  
sed tuj mi rememoris la Ordonon  
Diecan, kaj mi la dronanton prenis  
kaj donis al li savon kaj pardonon.  
Mi portis lin ja sur la lagan bordon  
kaj ĉerpis akvon el proksima fonto  
kaj donis al li trinki kaj afable  
parolis pri feliĉa ĉi renkonto.  
Patrino mia laŭdis mian agon,  
dirante: “Nun pardonas al vi Dio  
tre multajn ŝuldojn, ĉar vi mem pardonis,  
farante bonon kun abnegacio.”  
Post tiu tago mia panjo ofte  
vizitis min kaj bone min instruis;  
sed ofte mi ankoraŭ vojiradas  
en la krepuska marĉa regiono,  
serĉante helpi la malfeliĉulojn,  
kaj miajn ŝuldojn pagas per pardono.  
– Al tiu ĉi rakonto de l' amiko  
nur jenajn la parolojn mi aldonas:  
Hero' spirita al la malamiko  
helpeme faras bonon kaj pardonas.

4/2/1944

Stanislav Schulhof.

## PREĜO PRI PACO

Fonto de Amo, eterna Mistero,  
Patro ĉiela, de l' mondo Reganto:  
Vidu en kia terura sufero  
tenas la teron la Marsa giganto!

Ĉiuj popoloj ĝemadas amare,  
morto kruele orfigas l' infanojn,  
l' urbojn l' armiloj detruas senŝpare  
kaj neniigas loĝejojn kaj panojn!

Ŝajnas ke eĉ la raci' de l' homaro  
baldaŭ pereos en fajro-diluvoj;  
ŝajnas ke l' teron englutos la maro  
de la perfortoj, kaj ardaĵ Vesuvoj.

Patro, haltigu ĉi tiun deliron  
de l' atakantaj milit-ambicioj!  
Justan inspiru de Paco deziron  
al la gvidantoj de ĉiuj nacioj!

Paco-anĝeloj surteren alvenu,  
amon enblovu en homajn la korojn,  
la neniigon de l' vivoj detenu,  
plimalgrandigu l' amarajn dolorojn!

8/3/1944

Stanislav Schulhof.

## ĈU DEVAS ESTI TIO?

En tuta mond' teruraj krioj  
 dum jaroj jam ripetas sin;  
 sur disbatitajn urbojn, teron  
 milito verŝas sangon, feron,  
 kaj nevidebla, ĝis nun fin'.  
 De l' tera Nord' al Sud' kaj maro  
 timego, ploro sen komparo,  
 de Pacifik' al Sovetio,  
 – Ĉu devas esti tio?

Ĝisnune nesufiĉe havas  
 nesatigebla tiu drak'!  
 Antaŭ ol pasas du montatoj,  
 denove vicoj da soldatoj  
 alkuras nova al atak'.  
 Milmiloj kie kovras teron,  
 pliigi urĝas la numeron –  
 diskrevu kor', vastiĝu krio  
 – ĉar devas esti tio.

Malnova Kontinent', ĉu scias  
 vi, kia estos via fin'?  
 Ĉu scias vi, unuaranga,  
 ke sort' ekkaptis vin plej sanga  
 kaj vin atendas la ruin'?  
 El frukt' de viaj cerb' kaj sperto  
 fariĝas rubo kaj dezerto,  
 anstataŭ vivo – agonio;  
 ĉu devas esti tio?

Ho, eble tiel esti devas  
 por ke sur alta kamp' kaj hum'  
 el viaj plor' kaj sang' kaj ĝemo  
 elkresku nova bela semo,

kiu disiĝis en mallum' .  
Jen fin' de tragedio via!  
El mort' elkreskas mond' alia  
kaj polvo origin' de ĉio, –  
laŭ leĝ' eterna devas esti tio.

La kaŭzo de la tragedio  
de l' mondmilito estas nur  
dezir' de glor', kaj ŝovinismo,  
kaj ĝi kondukas al abismo,  
al sinmortigo de l' kultur' .  
Ne serĉu, popolo, vivspacon  
en fremda land', se volas pacon  
vi havi, sen glor-iluzio:  
morala leĝo atestas ja pri tio.

La tera globo estas granda  
sufiĉe por la tuthomar'  
vivanta sur la tersurfaco,  
kaj eĉ neniam mankos spaco  
sur ter', aŭ kavo en la mar' .  
Ke mankon homoj ne suferu,  
sin kiel fratoj konsideru,  
laŭ la kristana religio;  
kaj vivu ja laŭ tio!

La uzurpadojn Di' kondamnas,  
uzurpo estas ĉiam ŝtel;  
sed Dian Leĝon ne ofendas  
popolo, kiu sin defendas  
en lukto por tre justa cel' .  
Por justa cel' kiu batalas,  
hero' estas, eĉ se li falas  
kiel viktim' por la nacio:  
morala gloro estas tio.

9/3/1944

Stanislav Schulhof.



## SPIRITA AMO

Gloro al Amo Spirita, la forto  
kiu direktas de l' koroj l' inklinon,  
milde dolĉigas l' amaran destinon,  
restas fidela en vivo kaj morto,

agas sincere en penso kaj vorto,  
venkas de l' provoj severan obstinon  
kaj de la tentoj la sens-halucinon,  
kaj la tempestojn kaj luktojn de l' sorto.

Tomb' ne signifas de l' Amo la finon,  
al la ĉielo ĝi estas pasporto,  
kie renkontas la edzo l' edzinon,

amo se por li ne estis nur sporto;  
am' unuigas kun fil' la patrinon  
en la amplena anĝela kohorto.

9/3/1944

Stanislav Schulhof.

## LA BENO DE L' SILENTO

Kiam maltrankvila estas via sento  
kaj disputas akre koro kaj prudento,  
ol Okazi povos grava akcidento  
pacan forton serĉu mensa en silento!  
Eksilentu ĉiu de l' pasioj vento,  
eksilentu ĉiu plendo kaj lamento,  
ĉiu militemo de l' temperamento,  
la kontraŭa kaj la jesa argumento!  
Per ekprovo venos al vi l' evidento  
de ĉi tiu vero, bona kun atento.  
Se invados vin de duboj elokvento  
aŭ de malespero krio kaj turmento,  
pro l' malbona sorto granda malkontento:  
serĉu rifuĝejon mensa en silento!  
Se labori volas via kre-talento,  
via volo, ago kaj inteligento,  
pens' kvieta estu via instrumento,  
ĉar ĝi la plej bona estas kompetento.  
For de l' urba bru' kaj de l' nervoz-torento  
trovos vi la benon de l' anim-silento.

11/3/1944

Stanislav Schulhof.

## SUR LA KRUCO

De la homa maljusteco kondamnite,  
pendas la Justeco vera sur la kruco;  
Ĝi etendas siajn brakojn dolorŝvite,  
sur la teron falas ĝia sangoŝpruco.

La Justul' brakumi volas la homaron,  
sed la brakoj estas firme alnajlitaj,  
tial ili nebligas tiun faron;  
kaj mokridas la juĝistoj hipokritaj.

Kiam la Justul' ekĝemas: “Mi soifas”,  
la soldatoj donas al Li nur vinagron,  
ne sciante kion tiu ĝem' signifas,  
ne sentante de kompatato eĉ ekflagron.

“Liberigu vin, se venis vi de Dio”,  
krias la popolo maldankema, blinda,  
netuŝita de la granda tragedio;  
sed respondas la Justulo adorinda:

“Dio vin pardonu; mi pardonas vin”.  
Tion diri povas nur la Am' sen fin'.

7/4/1944

Stanislav Schulhof.

## LA RELEVIĜO DE LA SPIRITO

En la tombo de la korpo materia  
kuŝas la eterna viv-fajrero dia,  
kiu estas la Spirito nemortebla,  
eĉ se karno kaŝas lin per haŭt' putrebla.  
Tiun tombon la Scienco falsa gardas,  
en animo kies ambicio ardas.  
Sed dumnokte el la tombo la Spirito  
malaperis, malgraŭ la gardista sprito.  
Al la sent' virina baldaŭ li aperis;  
la kompreno vira dubi ja preferis,  
sed agnoskas fine, kiam li eniris  
tra l' fermita pordo: tion ĉiuj miris.  
Kiel releviĝis nia Krucumito,  
post la mort' leviĝas ĉiu homspirito;  
li ne putras kun la korpo materia,  
sed daŭrigas vivi en vual' alia.  
Estas ja diversaj, en Spirita spaco  
liaj korpo kaj loĝejo, land' de paco  
por l' animoj justaj, kiuj ĝin meritis,  
bonon faris kaj malbonon tre evitis.

8/4/1944

Stanislav Schulhof.

## HO, KIAM?!

Ho, kiam venos la feliĉa tago  
en kiu lumos sur la tuta tero  
la Sun' de l' kono de la Bon' kaj Vero,  
kaj malaperos ĉiu suferplago?

De ĉiuj ŝuldoj nur post la plenpago,  
nur kiam ĉiu de l' malic' fajrero  
estingos sin per am' kaj sinofero  
en ĉiu homa volo kaj imago.

Samkiel mortis mens' de kanibalo,  
la nuna mens' de la milit-batalo  
anstataŭiĝu per frateca Am'!

Ke ĉiuj homanimoj tion faru  
kaj Pacon fine la homar' deklaru,  
en sia kor' komencu ĉiu jam!

13/4/1944

Stanislav Schulhof.

## LA ĈIELIRO

Suferis sur la Kruco la Martiro  
kaj per Amo venkis la Turmenton  
Li, kiu venkis la demonan tenton  
kaj vivis ĉiam per Ĉiel-inspiro.

“Finite estas”, diris la sopiro  
de Kristo, kaj la buŝo en silento  
fermiĝis; la Spirit’ al Viv-latento  
reiris post la lasta brust-elspiro.

En la staltrogo ekkomencis Lia  
mistera, sankta laborad’ misia  
kaj finis per la venka Ĉieliro.

Jesuo, homoj, estu la modelo  
por vi, ke ankaŭ vi al la ĉielo  
alvenu post laboroj kaj aspiro.

17/5/1944

Stanislav Schulhof.

## **VERO, BONO KAJ BELO**

Por Vero luktu, kaj kun ĉiuj fibroj  
de via kor' defendu ĝin lojale;  
sed luktu ĉiam vere purmorale,  
per bonekzemploj, vortoj, agoj, libroj.

Nektaron kiel el la flor' kolibroj,  
el la Naturo ĉerpu ideale  
la bonon kaj la belon ĉiuskale  
per bonaj pensoj kaj per belaj vibroj.

Konservu ĉiam en plenekvilbroj  
la koron kaj la menson, senrivale;  
iliajn voĉojn ŝatu ja egale.

Disigu orajn grajnojn, per la kribro,  
de l' sablo, kiam juĝas vi neŭtrale:  
la Ver' al vi ekbrilos senvuale.

21/5/1944

Stanislav Schulhof.

**KONSILOJ**

Se vi volas ĝui pacon de la koro,  
ne liveru vin al pesimismangoro;  
ne malĝoju tre pro perdo aŭ doloro;  
pripensadu bone l' agojn kaj parolojn;  
kulturadu ĉiam helpon kaj konsolojn;  
ŝatu de l' Naturo fortojn kaj simbolojn.  
Al la hundoj perlojn vi neniam ĵetu,  
malpurec-piedoj ilin ke ne tretu  
aŭ en la kotaĵojn ilin ne enmetu.  
Ne liveru manĝon al malam', kolero;  
havu paciencon eĉ en mallibero  
kaj distingu inter falsa ŝajn' kaj vero.  
Dum surtera vivo pensu jam pri morto;  
bonkorecon spiru ĉiu via vorto,  
kaj vin akompanos ĉiam bona sorto.

9/6/1944

Stanislav Schulhof.



## LA MILITO

De la infer' en la malluma sfero  
forĝiĝis, sub direkto de Satan',  
pri mond-mastrado kruelega plan';  
Atila pensprojektis ĝin kaj Nero.

Akceptis ĝin kun rido de kolero  
Fernando Alba tuj, kaj Ĝengishan'  
kaj baldaŭ ĉiu menso de tiran'  
en la malluma regno de l' infero.

Sed kontraŭ la vandala konfedero  
leviĝis Harun-al-Raŝid' kun multaj  
ĉielaj batalantoj pro libero.

Gvidate de la franca Virgulino  
batalas ili kaj en la tumultaj  
militaj tagoj venkos je la fino.

17/6/1944

Stanislav Schulhof.

**REMEMORO KAJ FORGESO**

Ĉu estas ĉiam ben' la rememoro?  
kaj ĉu forgesoj estas malfeliĉaj?  
En Astralujo ambaŭ al la koro  
aperi povas ofte nesufiĉaj.

Memori scenojn de kristana amo  
al la spirito donas ĉielĝuon;  
sed pensi ree pri malicekflamo  
signifas de l' feliĉo la detruon.

Nur kiu kontraŭ tentoĵ en batalo  
surtere venkis, benas la memoron;  
sed al Sizifo ĝi kaj al Tantalo  
renovas ĉiuhore pundoloron.

Justuloj la suferojn ja forgesas,  
kaj rikoltadas benon de l' pardono;  
al Dio ili sur la voj' progresas,  
ne forgesante pri la ver' kaj bono.

20/6/1944

Stanislav Schulhof.

## LA PACO DE L' SINJORO

Ni petu la Sinjoron, ke Li donu  
al ĉiuj pacamantoj pacon Sian;  
ke al la homoj Li la lumon dian  
donacu kaj la pekojn Li pardonu.

Ke ĉiuj benon de la Pac' rekonu  
kaj ĝian kreaĵon forton energian;  
ke ĉiuj kulturadu preĝon pian  
kaj la pekantojn kontraŭ pac' admonu.

Regadu ĉiam Pac' en via penso,  
en viaj vortoj kaj en viaj agoj;  
regadu trankvilec' en via menso

sen timo eĉ en turmentegaj tagoj;  
plenumu viajn devojn sen murmuro,  
kaj Paco estos via mens-plezuro.

22/6//1944

Stanislav Schulhof.

**14<sup>a</sup> DE JULIO**

Mi cin salutas, memorinda tago,  
en kiu granda lum' al ni aperis:  
libreto de la vir', kiu esperis  
ke l' mondon feliĉigos lia ago.

Esperis Li, laboris kaj suferis  
por bono de la Esperanto-flago;  
de l' posteuloj la Aeropago  
la gloron donos, kiun Li konkeris.

Beninda tag', dekkvara de Julio,  
apero-dato de l' libret' unua  
de l' homa lingvo de korsimpatio!

Ne kiel de l' Bastiljo fal' detrua  
lumadas cia rememor' senbrua,  
sed per la bril' de l' homaram-vizio!

14/7/1944

Stanislav Schulhof.

**LEVU VIN AL LA SINJORO**

Levu vin al la Sinjoro, animo,  
kiam vi sentas minacon de l' timo;  
sciu ke Li, kaj nur Li protektadas  
kiam la timo la koron invadas.  
Plene konfidu al Lia protekto,  
levu vin, kuru en rekta direkto  
al la plej alta turpinto spirita,  
kiu neniam ja estas venkita,  
tiu turpinto de l' vera miraklo,  
sankta de l' amo kaj lum' tabernaklo:  
Kiam vi sentas malforton de l' koro,  
petu humile ke vin la Sinjoro  
per lumradioj de l' kredo fortigu,  
vian racion kun amo vi ligu  
kaj aŭskultante la voĉon de Dio,  
ligu bonagon kun bono-konscio.

7/8/1944

Stanislav Schulhof.

**KIAM LA TERO HAVOS PACON?**

Ĉu jam baldaŭ la milito  
plenfiniĝos sur la tero?  
Kiam venkos la spirito  
de la pac' en viv-mistero?

Kiam de l' milit' kruela  
neeblig'os la buĉado?  
Ĉu l' homaron la ĉiela  
Fort' fratigos per persvado?

Tiel, fratoj, vi demandas;  
en vi mem respondon trovos  
vi, se Vero vin komandas:  
Pacon nur pacem' alblovos.

Pacon se la mond' deziros  
en la pensoj kaj en ago,  
al la ter' ĝi ĝin altiros,  
kaj ĝin naskos pac-imago.

1/10/1944

Stanislav Schulhof.

?

Strangajn fortojn ekposedas jam homaro,  
sen distancoj estas jam planedo nia,  
tempojn, rokojn trapenstras homa vido,  
ekatakas kosmon, sen la fin' kaj limoj,  
la trezoroj de la ter' kaj vastaj maroj  
malfermiĝas al homaro avidega;  
unu restas nur kaj sola sekretaĵo –  
estonteco, kiun trapenetri vane  
la homaro ofte ekklopodis.  
Ĉu ni povos scii ke post la tempo  
plena je doloroj kaj je konvulsioj  
sekvos, kien ondoj ĵetas nian ŝipon?  
Ĉu el sang' kaj varmaj larmoj disverŝitaj  
nova tag' ekbrilos, aŭ ĉu nokt' terura  
etendiĝos sur la kampoj, urboj, homoj  
senegala en la homa historio?  
Pli ol nokt' malluma estas estonteco;  
ni ne povas scii, kion tag' venonta  
al ni donos, kion al ni ruze prenos,  
kaj neeble scii, ĉu okazintaĵoj,  
kiuj senegalaj estas, senekzemplaj,  
trovos foje iun, kiu ilin vestos  
per vort' poezia, simile al tiu  
kiu Trojan urbon, la miniaturon  
glorifikis por eternaj postaj tempoj.  
Se mi forton havus, kaj rilatojn kun la Muzoj,  
necesegajn por la task' simile granda,

ho, mi volus sur min preni tiun ŝarĝon,  
kaj konservi por venontaj posteuloj  
ĉion kio en la tagoj nunaj, plej pasiaj  
ŝprucas el la koro de l' homaro,  
ĉiujn agojn grandajn, preskaŭ superhomajn,  
sed eĉ zorgojn niajn, nekaŝante ombrojn.  
Sed se mi eĉ havus tiujn grandajn fortojn,  
se mi estus amatulo de la Muzoj,  
ĉu mi havus lingvon, lingvon vortoriĉan  
kompreneblan al la homoj senescepte,  
kiu apartenas al la mondo tuta,  
tute same kiel nunaj grandaj tempoj  
apartenos poste ne al rasoj, gentoj,  
sed al mondo tuta, simple: al homaro?  
Vane estus uzi mian lingvon patran,  
lingvon kiu sonis ĉe lulilo mia –  
en patruj' bohema oni min komprenus,  
sed la verkoj, kiuj foje apartenos  
al homaro, devas esti prikantitaj  
per la lingvo, kiu sen la landaj limoj  
sonos foje ĉie sur la tuta globo.  
Ĉu ĝi estas eble nobla lingvo franca,  
ĉu ĝi estas eble lingvo de Ŝekspiro  
aŭ ĉu ĝi de Kant, aŭ Dante, aŭ Tolstoj,  
ĉu ĝi eble estas la belega lingvo  
de antikvaj Grekoj, aŭ de Rom' potenca?  
Vane mi vin uzus, ĉar vin nur komprenus  
homoj, eble milionoj, sed mi volus  
kanti al homaro, ne al multaj homoj,  
ĉar nur la homaro foje ekkomprenos  
la suferojn kaj dolorojn de nuneco.  
Ĉu vi lingvo mia, mia Esperanto,  
povus al mi prunti sufiĉe da vortoj  
por esprimi ĝin, per kio nun ekstremas  
ĉiuj fibroj niaj, landoj kaj aero,



ĉion kio en terura uragano  
en konfuz' disfalos, renaskiĝos?

Grandan pezan ŝarĝon sur min nun prenante,  
mi ne preĝos al vi, Muzoj, Olimpanoj,  
sed humile mi sur teron falos  
kaj al vi mi preĝos, Majstro, vi amata,  
al vi Majstro, kiu en moment' ĉi tiu  
al mi ekaperas.  
Trajtojn viajn mildajn  
mi rekonas, kaj mi aŭdas voĉon vian,  
kiu sonas tiel dolĉe kiel sonis  
foje voĉ' de tiu, kiu mondon savis.  
Al vi mi nun preĝas, benon vian petas  
por la verko granda, kiun entrepreni  
mi kuraĝas. Ĉu vi helpas ne rifuzos?  
Ĉu vi ankaŭ donos al mi la permeson  
ke en la ĥaoso de l' okazintaĵoj  
vin mi ankaŭ nomu, tuŝu vian gloron?  
Mond' ne komprenebla estas sen Jesuo,  
kaj ne komprenebla estus la eposo,  
temp' en kiu estis ankaŭ vi la rado ...

(“La Progreso”, Dec. 1920).<sup>(\*)</sup>

---

<sup>(\*)</sup> Tiu poemo estas trovita inter la paperoj de la poeto D-ro Stanislav Schulhof, mortinta en Pardubice (Bohemujo) en 18 Aŭg<sup>o</sup> 1919. El ĝi oni vidas ke li projektis grandan epopeon, kiun la morto ne permesis al li verki.

*Teodoro Aleksandro Dolejš*, ĉeĥa pensulo, enmigris en Brazilon en sia juneco kaj verkis en la portugala lingvo rimarkindajn artikolojn aperintajn en *Reformador* kaj *Jornal Espírita* pri la senmorteco de la animo. Kiel esperantisto li skribis ankaŭ versojn. Li mortis proksimume en 1934.

## FRATA SALUTO

Al F. V. Lorenz

Mi ne povas skribi versojn,  
 kiel faris la aliaj ...  
 ĉar malofte sur la tero  
 mi ekprovis krei ilin,  
 tiel vi do ne atendu  
 de mi versojn heksametrajn  
 nek rimaĵojn, nek sonetojn.  
 Nur ritmeton, jen, observas  
 mi en tiu ĉi skribaĵo.  
 Venas mi, ĉar vi memoris  
 pri amikaj la rilatoj,  
 kiujn iam ni ŝatadis.  
 Ambaŭ venis ni Brazilon  
 el la sama lando, junaj,  
 ambaŭ la patrujon novan  
 ni ekamis tre sincere;  
 ambaŭ spiritualismon  
 inter la samideanoj  
 propagandis kun fervoro.  
 Mi jam pasis ĉi "astralen",

vi daŭradas sur la tero  
la spiriton preparadi  
kaj aliajn instruadi.  
Ne por laŭdi vin mi venis,  
sed nur diri konvinkite,  
ke laboro via estas  
tre utila, fruktodona,  
eĉ se ne tre multaj homoj  
bonkomprenas viajn vortojn.  
Ne laciĝu, kara frato,  
laboradu sur la kampo,  
por aliaj ĝin plugante,  
por aliaj en ĝin semojn  
spiritecajn ĵetadante,  
ĉar el semoj tiaj ĝermos,  
ĉu jam baldaŭ, aŭ malbaldaŭ,  
fruktoj, kiujn Dio benos.  
Nu, mi nur deziras ke vi  
ĉiam sentu la korpacon,  
kiun donas plenumado  
de la taskoj, destinitaj  
de l' Gvidantoj de l' Homaro.  
Fratecame mi brakumas  
vin kaj kore adiaŭas.

13/8/1943

Teodoro A. Dolejš.

**NE PERDU LA ESPERON!**

Ne perdu, fratoj, la esperon  
de la alveno de pli bonaj  
por ĉiuj tempoj kaj progreso  
de la ideoj fruktodonaj!

La semoj de l' ideoj ĝermas  
en preparitaj la hommensoj;  
la pluvo de l' sufero ilin  
kreskigas sur la kamp' de l' pensoj.

La suno, vento ilin nutras  
dum la printempo kaj somero;  
kaj venos tempo de rikolto,  
kaj fruktojn donos la espero.

Kulturu, do, la idealojn,  
se eĉ la tempo ne favoras;  
venkhoru venos certe, se vi  
konstante kun esper' laboras.

18/8/1943

Teodoro A. Dolejŝ.

**SIMILAJ KAJ MALSIMILAJ**

Sur la kampo kreskas herboj  
utilaj kaj malutilaj;  
sur la tero vivas ofte  
kune homoj malsimilaj:

Edzo saĝa kun edzino  
babilema kaj vantema,  
aŭ edzin' prudenta kun la  
edz' malsaĝa, kolerema;

studamanto inter homoj,  
kiuj studojn je ne ŝatas;  
hom' pacema apud homo,  
kiu krias kaj debatas.

En l' astrala mondo vivas  
kune nur simpatiantoj:  
katolik' kun katolikoj,  
protestant' kun protestantoj;

artamanto kun artistoj,  
nekredant' kun skeptikuloj,  
muzikist' kun muzikistoj,  
filantrop' kun bonfaruloj.

En inferaj sferoj vivas  
kaj kuniĝas malamantoj,  
la krimuloj nepentemaj  
kaj de bon' persekutantoj.

21/9/1943

Teodoro A. Dolejš.

## PRI LA ĈIELA URBO

Mi ne parolas pri la urbo bela,  
en kiu la animoj tre feliĉaj  
sin sentas, kie ilin lumo hela  
ĝojigas, nek pri la koloroj riĉaj  
aŭ kantoj de sublimaj harmonioj  
de la ĉiel-anĝelaj sinfonioj,  
ĉar mankas en ter-lingvo la esprimoj  
por bone tion per paroloj diri;  
ekzaktajn vortojn havas nur l' animoj  
el zon' tre alta, sed en ĝi mi spiri  
ne povus nun ankoraŭ, kvankam Dio  
permesis al mi scii jam pri io  
el tiu sfero, kie l' idealoj  
plej altaj de l' spirit' efektiviĝis,  
kaj kien post la venko en bataloj  
de l' viv' de l' provoj fine transportiĝis,  
al kiu la Juĝist' la rajton donis  
ĝuadi, kion Dia Mens' komponis.  
Mi kial tion do al vi mencias?  
Por vekti en vi veran intereson  
pri Dio kaj pri virto, ĉar mi scias,  
ke multaj homoj amas la progreson  
spiritan; havu ili do l' esperon  
por venki ĉiam surteran suferon.

27/9/1943

Teodoro A. Dolejš.

**“SE”**

Mallonga estas la vorteto “se”,  
signifo ĝia tamen gravas tre.  
La homoj ofte diras: “Se mi povus”,  
aŭ “se mi tion farus, vidus, trovus”...  
sed nur malofte ili fari povas,  
ĉar ili tempon nek serĉas, nek trovas;  
nek por ekvidi, ili ja rigardas,  
kaj de trompiĝi ili sin ne gardas.  
Se oni vere volas veron vidi,  
al veramantoj oni devas fidi;  
se oni vere volas veron scii,  
ĝin serĉu kaj eklernu ĝin konscii;  
en la spirito propra serĉu ĝin!  
Al lum’ la lumo manifestas sin.  
Se vi deziras bonon post la morto,  
kaj esti protektata de la sorto,  
surtere ĉian eblan bonon faru  
kaj tiel por feliĉo vin preparu!  
Ne dubu pri l’ eterna vivo, ne!  
Vi vivos en la mondo de l’ Ide’.

28/9/1943

Teodoro A. Dolejŝ.

**LIBERA VOLO**

Mi diris iam <sup>(\*)</sup>, ke en l' Astrallando  
grupiĝas kaj kunvivas la spiritoj  
laŭ simileco de iliaj amoj,  
ideoj, opinioj kaj preferoj;  
kaj tiaj amoj kaj ideoj formas  
ilian staton, ĉu feliĉan vivon  
aŭ malfeliĉan, laŭ la justa Leĝo.  
Sed ĉiu spiritento konservadas  
liberan volon kaj decidi povas  
pri sia stat' estonta: ĉu li volas  
daŭrigi la okupojn elektitajn,  
aŭ fari ŝanĝojn en kutimoj siaj.  
Libera estas lia vol-decido,  
en tiu grado, kiun ja permesas  
la saĝaj Leĝoj de l' Di-providenco.  
Spirito ĉiu povas do leviĝi  
el sfer' malalta al pli alta sfero;  
ne estas devigata resti ĉiam  
sur sama grado, sed li povas studi  
kaj provi la kondiĉojn alisferojn.  
Eĉ el infera stato li saviĝas,  
sed nur, se li plenumas la kondiĉojn:  
ekpentis kaj komenci fari bonon.

2/10/1943

Teodoro A. Dolejŝ.

---

<sup>(\*)</sup> En la poemeto *Similaj kaj malsimilaj*.



## PROFITU LA TEMPON!

L' agrikulturisto profitadas  
la sezonojn por laboroj siaj,  
li observas staton de l' vetero,  
ne fidas je planoj utopiaj.

Semas li aŭ plantas post la pluvo,  
sarkas, se vetero estas varma,  
kaj rikoltas fruktojn nur maturajn,  
kiam la rikolto estas ĉarma.

Komercisto vendas kaj aĉetas,  
kiam la kondiĉ' al li konvenas;  
dum la labortagoj de l' semajno  
prudentul' laboras, ne promenas.

Ankaŭ se vi volas por progreso  
fari verkon bonan, konsideru  
ĉu la tempo kaj kondiĉoj taŭgas,  
ke la verk' profitu kaj prosperu.

Venis tempo propra por klarigi  
la homaron pri l' kondiĉoj veraj  
de la paco inter la popoloj,  
pri la idealoj senhimeraj;

Pri l' frateca sankta harmonio,  
pri la pura amo senpasia;  
do profitu, homoj, nun la tempon,  
kaj vin gvidos la Saĝeco Dia.

5/10/1943

Teodoro A. Dolejš.

**POST TRIDEK TRI JARCENTOJ**

Post tridek tri jarcentoj  
 egipta eks-princino venis  
 kun siaj vortoj, sentoj  
 al homoj, kiuj ŝin komprenis!  
 Per medium' parolis  
 ŝi lingvon de l' hieroglifoj,  
 kaj pruvon doni volis  
 pri la prononco kaj signifoj.  
 Pri sia viv' rakontis  
 ŝi kaj pri l' glora dinastio,  
 kaj kiel ŝi renkontis  
 la kunulinon de l' misio.  
 Telika, Di' vin benu  
 pro l' nobla pen' kaj idealo!  
 Kaj homoj, vi komprenu  
 de l' viv' eterna la realon!  
 Post tridek tri jarcentoj  
 Telika venis, kun memoro  
 de la antikvaj sentoj  
 kaj vortoj, kaj antikva moro!  
 Ŝi venis pruvi klare,  
 ke vivo daŭras eĉ en morto,  
 kaj povas postmiljare  
 aŭdiĝi ree ĉiu vorto.

14/10/1943

Teodoro A. Dolejš.

## PAROLI KAJ SILENTI

Ĉiuj homoj konas la proverbon:  
“Parolad’ similas je arĝento,  
sed je or’ similas la silento.”  
Tamen mi aldonas mian penson:  
La silento orvaloron havas  
tiam nur, se ne-paroli pravas.  
Ne-paroli estas multafaĵe  
peko, aŭ almenaŭ ĝi eraro  
estas, aŭ malkonsilinda faro;  
se vi ne respondas al demando  
serioza, estas ag’ nesaĝa,  
neprudenta, laŭ kutim’ sovaĝa.  
Do respondu al la demandanto,  
kiam estus la respond’ utila,  
kaj al vi se estos ĝi facila.  
Sed silentu al demand’ malsaĝa,  
aŭ al la parolo fanfarona:  
tiam la silento estos bona;  
kaj parolu, se vi povos doni  
priklarigon, lumon al animo:  
pri la ver’ instruu ja sen timo “

14/10/1943

Teodoro A. Dolejš.

## NATURO KAJ ARTO

Multaj homoj diras, ke kulturo  
 estas io mala al naturo;  
 kaj ke nur naturo havas vivon,  
 arto ke nur kreas negativon,  
 kiu al homaro ne utilas,  
 se naturon ĝi ne asimilas.  
 Mi demandas tamen: Kio estas  
 la naturo? Ĉu ĝi ĉiam restas,  
 kio ĝi jam estis? neŝanĝema?  
 La demando estas ja problema.  
 La naturo al prahomo ridis  
 kruelege kaj lin brute gvidis,  
 kiam li militis pro malsato  
 kontraŭ bestoj, kontraŭ homa frato.  
 Kiu venkis la sovaĝajn bestojn?  
 Kiu faris domojn kaj vestojn?  
 Kaj la veturilojn? Ĉu l' naturo?  
 Ne! sed de la arto la susuro.  
 Kamp' natura estas tre malriĉa,  
 sen labor' ĝi estas nesufiĉa  
 por produkti fruktojn, panon  
 kaj por nutri eĉ la vilaĝanon.  
 Ĉiam donas la natur' komencon,  
 kaj la art' riĉecon kaj sciencon.

15/10/1943

Teodoro A. Dolejŝ.

## PRI LA AMO

Vera amo, la ekflamo  
de du simpatiaj koroj,  
estas riĉa de feliĉa  
ĝojo kaj eĉ de doloroj.

Ĝi ne mortas, se alportas  
la vivado la suferon,  
havas ĉiam la esperon,  
kaj neniam malesperon.

Vera amo, Dia flamo,  
donas fortojn al la homoj,  
fortojn eĉ de korpatomoj  
al herooj sen glornomoj.

Vera amo sin mem donas,  
la ofendojn ĝi pardonas,  
volas ĉiam bone servi  
kaj de l' vivo celon konas.

Vera amo ne pereas,  
vivas ĉiam, vivon kreas.  
Kie ĝi en koroj tronas,  
anĝelkanto dolĉe sonas.

17/10/1943

Teodoro A. Dolejŝ.

*Nota.* – En tiu mateno la mediumo ricevis la viziton de sia filino Marta Lorenz Hüber, edziniĝinta antaŭ 4 monatoj, kaj petis ke ŝi sidiĝu kaj ĉeestu lian median laboron. En la ĉeesto de la juna sinjorino la Spirito de Dolejŝ, amiko de la familio Lorenz, skribis tiujn belajn versojn.

Do la versoj estas dediĉataj al S-ino Marta, kvankam la poeto tion ne skribis.

**AL FRANCISKO KANDIDO XAVIER**

F rato kaj amiko mia kara,  
 R evadanta pri la bon' homara:  
 A nĝelpura estas via menso,  
 N etuŝebla al malbona penso;  
 Ĉ iam sin fermante al fiero,  
 J am ĝi estas riĉa je sufero.  
 O rriĉecon ja vi ne avidas

K iam ĉe aliaj vi ĝin vidas.  
 A lta estas via Idealo:  
 N ur deziras vi, ke en l' Astralo  
 D io vin per Sia Lum' instruu,  
 I manenta ver' ke vin influu.  
 D o ni laŭdas vian vivo-vojon,  
 O ferantan al vi veran ĝojon.

X avier', ni ŝatas vian koron  
 A moplennan, kiu la doloron  
 V enkas, konfidante nur al Dio,  
 I mitante Jesuon en tio,  
 E kzemplegon, kiun ni komprenu!  
 R egu Li en vi, kaj Li vin benu!

Kune kun aliaj spiritoj-samideanoj salutas vin

31/10/1943

Teodoro A. Dolejŝ.

**AL LA NOVJARO 1944**

La jaro mortis; vivu do la nova!  
La rado de la tempo, ĉiam-mova,  
antaŭen kuras, kiel volas Dio  
kaj dum la jar' efektiviĝos ĉio  
skribita en la saĝa, Dia plano,  
kaŝita al la vido de l' terano.  
En tiu plano, homa vol' libera  
sur vojo, aŭ interna aŭ ekstera  
por diaj celoj povas kunlabori,  
aŭ siajn proprajn celojn ja esplori.  
Ke kun la saĝaj planoj la homaro  
dezirojn siajn, dum ĉi tiu jaro  
plenumigu, ankaŭ ni deziras  
kaj tiusence, fratoj, al vi diras:  
Feliĉon veran la homar' posedu,  
kaj de l' Pasint' nur Bonon ĝi heredu!

1/1/1944

Teodoro A. Dolejŝ.

## LA VIRINO

Tre ŝatinda estas virgulino,  
ĉarme ŝin ornamas la pudoro,  
la plej granda de l' junec' trezoro,  
de l' feliĉ' virina riĉa mino.

Kun matura aĝo la destino  
skribas novan leĝon en la koro;  
plialtiĝas de l' virin' valoro:  
ŝi edzino iĝas kaj patrino.

Post juneco de la ĉarmaj floroj  
venas seriozaj vivlaboroj;  
kaj en ĉiuj penoj la virino

amas kun fidela korinklino,  
preta ĉiam por suferoj mil  
pro la bon' de sia kara fil' .

14/2/1944

Teodoro A. Dolejŝ.

---

*Noto.* – Ĉeestis S-ino Marta Lorenz Hüber, filino de la  
mediumo.



## TROSEKECO KAJ PLUVO

Ĝemas pro la trosekec' la tero;  
la plantaĵon la soif' torturas;  
la velkanta foliar' murmuras  
preĝon al la Reĝo de l' aero,

Ke haltigu Li de l' malespero  
l' ondon, kiu tra la mondo kuras  
kaj malsaton kun la mort' aŭguras,  
se daŭrados plu la sekvetero.

Materialismo estas tia  
blinda trosekec' de kred' sendia,  
kiu vivon de l' animoj neas;

sed alvenis kvazaŭ milda pluvo  
Spiritismo, kaj per ĝi la pruvo  
ke post mort' l' animoj ne pereas.

15/2/1944

Teodoro A. Dolejš.

**PRI L' GEFILAJ DEVOJ AL LA GEPATROJ**

Fil' , la grandan amon ne forgesu  
de la nobla koro de l' patrin';  
ke vi vivu, ŝi oferis sin  
al sufer'; do ami ŝin ne ĉesu!

Multan dankon ŝuldas vi, konfesu,  
al ŝi pro l' anĝela am' sen fin';  
ŝi preĝadas, protektante vin,  
ke vi ĝojon havu kaj progresu.

Amu ankaŭ vian patron bonan;  
li por vi prizorgas la bezonan  
panon, veston, liton, edukilon;

Ŝatu lian volon kaj konsilon!  
la gepatrojn se estimos vi,  
benos vin l' anima Patro, Di'.

15/2/1944

Teodoro A. Dolejš.



**DUA PARTO**

**EL “PARNASO DE ALÉM-TÚMULO”**

de

**FRANCISKO CÂNDICO XAVIER**

**Tradukis F.V.Lorenz**



*Abílio Guerra Junqueiro*, la plej fama portugala poeto post Luiz de Camões, naskiĝis en 1850 kaj mortis en 1923. Dum la vivo li verkis diversajn famajn librojn kaj

post la morto, per la mediumeco de F-ino América Delgado, li diktis du novajn volumoj. En la verko *Parnaso de Além Túmulo* aperas diversaj longaj kaj belaj poemoj ricevitaj de li per la mano de la mediumo Francisco Cândido Xavier.

## ETERNA VIKTIMO

En la silenta pac' de l' vert' de Kalvario  
ankoraŭ sur la kruco pendas la Mesio.

Jarcentoj dudek da doloro agonia  
haltadas en l' okul' de l' Filo de Maria.

Suferas, forlasita sur la monto seka,  
senfinan turmentegon la Viktim' senpeka;

Skurĝita, perfidita, Li en plend' pro l' fato,  
de l' ter' al la ĉiel' rigardas kun kompatato.

Dum du jarmiloj la murdistoj Lin turmentas  
sen ĉes', kaj kiel tigroj, kompaton ne sentas.

Tre multaj reĝoj, tronsidantaj kaj glorataj  
per la trumpetaj voĉoj de trupoj soldataj;

Ĉevalrajdantaj famaj herooj de l' tero,  
skribantaj leĝojn per la fajro kaj per fero;

Ĝentilaj kavaliroj bravaj, kaj nobeloj  
fieraj, kun blusango, kaj kun ormanteloj,

Lin preskaŭ-nudan, sur la kruc' sangantan vidis  
kaj pri la stulta kondamnito moke ridis!

Kaj Krist' humile kaj sen plendi pri la fato,  
la teron rigardadis plue, kun kompato.

Saĝuloj, kiuj sanktajn librojn tre admiris,  
rigardis Lin kaj tuj senvorte preteriris.

Artistoj, histrionoj, poetar' kun kantoj,  
virinoj junaj, riĉaj, aroj da ĝuantoj,

Kaj ankaŭ kiuj eĉ en Lia nom' militojn,  
malsaton dissemadis kaj mallumajn mitojn,

Terurojn, plorojn, fratmortigon sen dueloj,  
ŝakaloj, lupoj, tigroj sub kristan-manteloj:

Rigardis Kriston krucumitan sur la monto  
kaj multobliĝis multimurdojn sen ekhonto.

La Majstro sen makul', sen plendi pro la fato,  
la teron rigardadis plue, kun kompatato.

La stranga karavano en la nun-epoko  
haltadas apud tiu kruc', en sama loko.

Sed la antikvaj reĝoj, iam tre fieraj,  
hodiaŭ estas almozuloj nur mizeraj;

La nobelar' iama, homoj bravaj, riĉaj  
hodiaŭ estas nur parioj malfeliĉaj.

Nun ili vidas sur la monto Kalvario  
l' oferon sanktan, doloregan de Mesio,

Kaj "Helpu, Kristo!" ili krias kun furoro,  
"ke venku ni de nia kruco je l' doloro;

Sorbante de l' sufer' la galon kaj korlacon,  
ni petas la pardonon kaj soifas pacon."

Kaj la bonkora Majstro, de la virt' anĝelo,  
pardonon mildan donas, de la Am' modelo;

De sur la kruc', kviete, per okul' de frato,  
la homojn Li konsolas per Sia kompatato.

Abílio Guerra Junqueiro.



*Antero de Quental*, portugala poeto naskita en Aco-roj en 1842 kaj mortinta en 1891, per memmortigo. Liaj sonetoj estas vere modelaj kaj enhavas profundajn pensojn.

## AL LA MORTO

Ci, Morto, estis de mi adorata  
kvazaŭ la fin' de l' nigra agonio,  
kvazaŭ en ci la pacon de l' Nenio  
mi trovus post la kurba vojo fata.

De miaj dolorhoroj en ebrio  
al mi ridetis ci, pasi-amata,  
kaj la vizaĝ', per ĉerka krep' kovrata,  
rigardis min silente en vizio.

Ĉar en mi mortis jam animo mia,  
mi serĉis cin, perdinte la esperon;  
freneze frapis mi sur pordo cia,

kaj malfermiĝis tiu pord' malhela,  
kaj mi eniris pluan en suferon,  
sur vojo pli malĝoja, pli kruela.

Antero de Quental.



## POST LA MORTO

### I

Al mi la mondo montris nur doloron;  
amara estis ĝi, nekonsolebla,  
kaj en malĝoj-vual' nepenetrebla  
ĝi multobligis de l' anim' l' angoron.

Se ĝoj-ridet' vizitis mian koron  
for de la amareco neŝanĝebla,  
plezuro tiu estis deĉifrebla  
nur kiel iluzio sen valoro.

Por mia vid' malgaja kaj senkreda  
de hom' pensanta kaj tre suferanta  
ekzistis nur doloro peza, teda.

La ĝuo estis sonĝo de momento,  
plezuro nur imago min trompanta  
kaj vojo al pliiĝo de l' turmento.

Antero de Quental.

**II**

Mi, mizantrop' de la scienc' trompanta  
portadis en mi la nerezisteblan  
deziron: Dion, la nedifineblan  
ekkoni en vizio konsolanta.

Mi Lin serĉadis kun deziro vanta  
satigi la aspiro nedireblan,  
kvankam mi povis Lin, la Nekoneblan,  
sentadi en la vivo kreadanta.

Sed la nekredo kaj fiero mensa  
ekziston mian gvidis, tre konsternan  
kaj plenigitan de dolor' intensa.

Mi tiam pensis, en la vanto peka,  
en morto trovi l' estingon eternan  
en la malluma pec' de grund' malseka.

Antero de Quental.

### III

Kaj post l' ekstravaganc' de teorio  
de la scienco, tiom variema,  
pri l' grava solvo de l' demand' problema  
rilate je l' dubata Bona Dio.

mi mortis kaj ekkonis, kun konscio,  
ke malgraŭ l' opinio neigema,  
l' enigmo solvas sin per Morto mema,  
de l' tero al ĉiel' la liglinio.

Pensinta estis mi, ke en ĉi sfero  
loĝadas senkonscio kaj mallumo,  
min ofte blindiginta sur la tero;

sed trovis mi, ĝemante, lumon helan  
de l' brila ver', kies eterna sumo  
lumigas ĉiun spacon interstelan.

Antero de Quental.



*Antônio Nobre*, portugala poeto, aŭtoro de la libroj *Sola* kaj *Adiaŭoj*, aperintaj en 1902. Li mortis 34-jara en Porto.

## AL LA MONDO

La ter' abismo estas de la ploro,  
de l' amarec' la val' , laŭ la Psalmisto;  
marĉplena lando, koto sen rezisto,  
naŭzanta per la verma putrogoro.

Sed por la grandaj bonoj, por l' ekzisto  
de perfektec', kaj por la lum-valoro  
bezonas ni la karnon, por laboro,  
kaj la martelon skulptan de l' artisto.

Ho Tero, tre trankvile mi vin benas,  
ĉar el doloro via mi flugvenas  
al la loĝejo kun la lum-abundoj;

altigas, savas nin via severo,  
sed vi restadas de l' mallum' karcero,  
malgaja mondo de pusantaj vundoj.

Antônio Nobre.



*Augusto dos Anjos*, brazila poeto, profesoro, naskita en 1884 kaj mortinta en 1914. Li lasis nur unu libron – *Mi* – kies strangan tekniko donis al li originalan famon.

## LA DOLORO

El kie venas tiu fort' mistera  
de la doloro, ĉiam ĝem-malsata  
kaj, kiel la kartoĉ', en pafo fata,  
trafanta en batalo neprospera?

Kruda, kruda klabo tre danĝera,  
de kanibal' en luktoj preferata,  
vundanta kun certeco senkompata,  
senĉese nin sondadas ĝi, severa!

Ne el Divolo ĝia origino  
devenis, nek el fata viv-destino,  
pro kiu mortas la ĉeloj sentantaj;

ĝin naskis niaj propraj malbonfaroj,  
en kies ignorataj abismaroj  
ni vagas tra ekzistoj sinsekvantaj.

Augusto dos Anjos.

## HOMA VOĈO

Eksonas voĉ’; du, tri, da voĉoj centoj  
kaj milionoj. Kosmopolitismoj.  
Sovaĝbestar’ sub jug’, en paroksismoj,  
ululas dum la furioz-momentoj.

La homa voĉ’ estas neŭroz-lamentoj,  
jen en konceptoj de la ateismoj,  
jen eĉ ligite al la gnostikismoj  
en la singultaj agoni-turmentoj.

Mi en peteg’ eterna tion vidas,  
ke la dolor ĉiam pli avidas,  
nesatigebla de l’ plezur’ per ĝuo.

Sed la dolor’, en nia ĝem’ ridante,  
laboras kaj teksadas, tre konstante,  
la brilon de la kosma evoluo.

Augusto dos Anjos.

## LA ANIMO

En karamboloj ciklopaj, titanaj  
mi sur la ter' serĉadis kun pasio  
l' animojn, pere de psikologio,  
kaj inter l' estaĵoj senorganaj.

En larmoj, timo, en ridoj spontanaj,  
en la perturboj de hipoĥondrio,  
en difektoj de fizionomio,  
en la instinktoj vulgaraj, tiranaj:

trovadis mi nur korpojn en ekzisto  
kaj sangon en senĉesa bol-persisto,  
kun impulsoj teruraj, neetikaj.

Mi tiam, blindfreneza, vidis fumojn  
kaj ne de l' astroj ĝi l' ameb' la lumojn  
de la anim' en sekretoj tragikaj.

Augusto dos Anjos.



*Casimiro Cunha*, blinda brazila poeto naskita en Vassouras en 14-4-1880 kaj mortinta en 1914. Tre malriĉa kaj blinda, li tamen estis feliĉa pro sia religia kredo kiel spiritisto kaj verkis ĉarme simplajn versojn dum la vivo kaj nun per mediuma mano jam verkis tre belan libron.

## KVARVERSAĴOJ

Blindul' , nenion vidi  
 en nokto dolorvoja,  
 kaj poste vidi lumon  
 de l' tagaŭroro ĝoja;

En mallumeco plori,  
 mergite en ĝemfluon,  
 kaj post sufero trovi  
 senliman, dolĉan ĝuon;



En plenblindeco sorbi  
la galon de l' amaroj,  
kaj poste serĉi amon  
en lumaj altaĵaroj:

Trezorojn havi estas  
de paco, lumo, vido,  
sub la protekto Dia  
kaj de Jesu' sub gvido.

Casimiro Cunha.

**VERSOJ**

De l' ombroj en loĝej' mi vivis  
ekzilita,  
en densa nokto de mallumoj  
enĉerkita.

Mi en mallum-tombejon falis  
naskiĝante,  
kaj fuĝis for el ĝi feliĉe  
mi, mortante.

Ĉar vivo materia estas  
la karcero,  
en kiu la animo ĝemas  
en sufero.

Kaj la sirita vivo estas  
la libero,  
kie ricevas ni la lumon  
de la vero.

Casimiro Cunha.

## OMBRO KAJ LUMO

Post la nokto tago venas,  
post burĝon' naskiĝas flor';  
ĝoj' kaj amo se nin benas,  
la doloro fuĝas for.

Tiel post la amaraĵoj  
de la vivo sur la ter',  
al l' anim' en la altaĵoj  
venas lumo, pac', prosper'.

Casimiro Cunha.

## LA TROMPIĜO

Ofte diras la scienco:  
 “Estas trompo iluzia  
 kredi je postmorta vivo  
 ie ajn en mond’ alia.”

Arogante ĝi asertas:  
 “Kredo stulta! Estas morto  
 dorm’ eterna kaj trankvila  
 post la tera luktosorto.”

Sed la kred’ humila diras:  
 “Ci, scienco, ja pli poste  
 estos de la kred’ sozi’,  
 ne irados ja sen mi.

Mort’ se estos dorm’, ni dormos;  
 sed se ne, de iluzi’  
 kiu estos do trompita?  
 Ĉu trompiĝos mi, aŭ ci?”

Casimiro Cunha.

## SIMBOLO

Sur la koto de rubaĉo  
flor' lilia ridetadis,  
blanka, bela, delikata,  
ĝi taglumon parfumadis.

En ĉi floro karesinda  
inter marĉaj malpuraĵoj  
vidis mi de l' bon' simbolon  
inter mondaj malbonaĵoj.

Ĉar bonkoro povas vivi  
sur malgaja dolorhumo,  
en aflikton radiante  
belajn flagrojn de hellumo.

Kaj la koro, kulturanta  
la kariton kaj la amon,  
estas freŝa flor' aroma,  
elspiranta la balzamon.

Ĝi en densa eĉ mallumo  
de la mondo nekultura,  
estas brila flor' lilia  
de kristana amo pura.

Casimiro Cunha.



*Casimiro de Abreu*, brazila poeto naskita en 18-10-1850 kaj mortinta en sia 23<sup>a</sup> jaro de vivo. Liaj lirikaj versoj estas parkere deklamataj de la brazilaj gejunuloj.

## LA TERO

Estas sur la ter' malhelaj  
 noktoj kun tempest-bruadoj,  
 kaj malĝojoj kaj saŭdadoj,<sup>(\*)</sup>  
 amarec', malplacoj mil;  
 sed ekzistas ankaŭ tagoj  
 kun sunlumo kaj prospero,  
 melodio, ĝoj', espero,  
 kantoj de eterna bril' .

Estas ja la ter' feliĉa  
 mondo, paradiz' de floroj,  
 plena de ridantaj koroj,  
 en la lum' ĉe l' ĉielpord' .

---

<sup>(\*)</sup> *Saŭdado* = soleco, sopiro, dolĉa rememoro, malĝoja dezirego vidi iun aŭ ion amatan forestantan. – I. G. B.

Himno de la fort' kaj vivo  
pulsas en la mar' kaj fontoj  
kaj resonas tra la montoj,  
eĥas ekde Sud' al Nord'.

De l' junec' la lumaj revoj,  
pompaj festoj de l' naturo,  
libro de belec', plezuro,  
paĝoj helaj kaj de glor';  
kie historioj estas  
la trilkantoj de l' birdetoj,  
kaj pentraĵoj la nestetoj  
stampitaj en verd-kolor'.

Kie reĝoj ja poetoj,  
flugilhavaj trobadoroj  
estas kaj heroaj koroj  
kun orkanta amdeklar',  
kaj salutas l' aŭror-nimfon  
kiam venas ŝi, lumardas  
kaj fiere sin rigardas  
en la speguleg' de l' mar'.

Kie la princinoj floroj  
estas, sin kisante lumas  
kaj la herbejojn parfumas  
per la dolĉa amospir',  
kaj centope burĝonante  
ĉe la strat' al hom' oferas  
belon, kian li preferas,  
kun rideta ĝoj-aspir'.

Tuta tago estas himno  
de tre dolĉaj belosvarmoj;  
nokto tre agrablaj ĉarmoj  
de la lun' en blankvual' .  
La vesper' la stelojn kisas,  
l' astroj sunon aperantan,  
sun' la kampon ridetantan,  
la ĉielon kamp' kaj val' .

Kiu en Edeno tiu  
vivas, kun ridet' kaj forto,  
ne deziras ke la morto  
de la viv' disigu lin;  
la feliĉon trovi scias  
en fortika la ĝardeno;  
por sufer', batalĉagreno,  
je esper' plenigas sin.

Estas sur la ter' malhelaj  
noktoj, plenaj je doloroj,  
pezaj larmoj kaj angoroj,  
krudaj ĝemoj, afliktiĝ';  
sed ekzistas ankaŭ tagoj  
oraj de junec' kaj lumoj,  
ridoj, floroj kaj parfumoj,  
revoj pri l' estont-feliĉ' .

Casimiro de Abreu.





*João de Deus*, portugala poeto naskita en 1830 en Sankta Bartolomeo de Messines, mortinta en 1896. Ĉarme lirikaj estas liaj poemoj ĝis nun tre ŝatataj en la tuta portugallingva mondo.

## LA LEPRULO

Diris la leprul' malriĉa:  
 "Di', mi estas sen vivgrundo,  
 tuta jam pusanta vundo  
 en la mondo malfeliĉa!"

Sed l' Anĝelo, Di-servisto  
 lin konsolas: "Fil', ne plendu;  
 la feliĉon ja atendu  
 kun espero, fid', persisto.

Puso, kot', se korpo via  
 estas meze de l' turmentoj,  
 l' anim' estas lum' radia  
 de l' eternaj firmamentoj."

João de Deus.

## BONKORECO

Iradas, jen, Miserulino  
sur plac' kaj kovras per mantelo  
de malfeliĉo kaj malhelo  
l' aflikton pezan de la kor'.

Riĉeco antaŭ ŝi sin kaŝas,  
fuĝigas ĝuon ŝia palo;  
ŝi sentas l' amaron de l' galo,  
de la malĝojo kaj dolor'.

Sed Bonkorec' kun amparolo  
malfermas pordon de konsolo  
kaj lumo, kaj invitas ŝin:

“Varmiĝu ĉi en mia domo,  
satiĝu. Kia mia nomo?  
Mi estas via kor-fratin' ”.

João de Deus.



*Raúl de Leoni*, brazila jursciencisto, naskiĝis en Petrópolis en 1895 kaj mortis en Itaipava, en 1926, kiam li estis nur 31-jara.

Malgraŭ sia tre mallonga vivado, li estis ŝtata deputito kaj Ambasadara Sekretario, kaj verkis altŝtatajn poemojn.

## SONETO

Ne vivu sur la Ter' en apatio.  
 Kun am' laboru, fide, kun espero;  
 de l' malbonaĵoj venkas ja nenio  
 l' animon puran, bonan kun sincero.

Persiste servu al la bon' kaj vero,  
 sen peti rekompencan ja pro tio.  
 Larĝiĝas per dezir' de bon' la sfero  
 de l' sanktaj lumoj de la Kred' je Dio.

Vivadu en lumturo, la brilanta  
de la kastelo de la amo sankta  
kaj de l' purec-odoroj kun provizo:

Vi tiam vivos kun trankvil', sen timo  
kaj mort' ne estos por via animo  
terureganta, tragika surprizo.

Raúl de Leoni.